

MEGYEI KÖNYVTÁR
SALGÓTARJÁN

HUNGARA VIVO

2
1977
8.- Ft

La mondfama LIPTON teo
pakita de COMPACK

HUNGARA VIVO

Revuo de Hungara Esperanto-Asocio
Adreso: H—1081 Budapest
VIII. Kenyérmező u. 6.
Poŝta adreso: H—1368 Budapest
Pf.: 193.
Aperas dumonate
XVI. jaro 1977. 2-a numero

Numero pri Julio Baghy

ENHAVO

Pri Julio Baghy 1
Boulton, M.: Julio Baghy, la lirikisto 2
Poemoj de J. *Baghy* 4
L. L.: Tiel instruis J. Baghy 5
Baghy, J.: Fragmento el la romano Hura! 6
Baghy, J.: Estas mi esperantisto 8
Benczik, V.: La prozo de J. Baghy 9
Juhász, Gy.: Kia estis . . . ? (Tr. J. *Baghy*) 11
Csák, Gyula: Balado pri la pano kaj cirko (*Varga—Haszonits Zs.*) 12
Rados, P.: Literatura metiejo 14
Sokalówna, B.: La hedero 15
Bálint, *Sz.:* Panoramo 16
Szabó, R. M.: Revuo de revuoj 18
Ferenc, László: Kien direktiĝas la akvomastrumado? (A. *Pechan*) 19
Enhavtabelo (Kökény) 25
Libroj por ĉiuj 27
Lesznay, Lajos: Hungaraj muzikistoj . . . 28
Benczik, Vilmos: Zigzage tra librolando 29
A. P.: Paŭlo Balkányi 29
Paĝo de FERI'. Adiaŭo de FERI' 30
Lingvaj ludoj, Humuro, Ŝako 31
Kiel eksterlandanoj povas aliĝi al Universitato? 32
Leterkesto 32

Sur la titolpaĝo: Julio Baghy — foto de Árpád Pölöskey

PRI JULIO BAGHY

Postulante multe de la aliaj, la poeto postulas tre multe ankaŭ de si mem. Li estas modesta, li ne levas aroge la kapon, lin ne altiras la pompo kaj pri si mem li parolas ĉiam per minoraj tonoj. Sed sub la nebrilaj, modestaj vortoj ni klare rimarkas tiun grajneton de radiumo, kiu estas la animo de la poeto, vindita per la delikata ŝtofo de lia poezia talento.

Nikolao *Hohlov*, en 1923

Lia unua poemaro, la *Preter la vivo* (1922) montris novan vojon al la Esperanta poezio, la vorto, la rimo, la bildoj ricevas novan signifon kaj en la abundo de la novaj belaĵoj la leganto estas forsorĉita, ĉu temas pri individua temo, ĉu pri homaranismaj pensoj. En lia verkaro eĉ la multe prikantitaj temoj aperas kun la efiko de la novo, ĉar la verkado estas lia bezono kaj li ĉiam trovas originalan formon en la esprimo de siaj pensoj.

Ferenc *Szilágyi*, en 1934

Kiel Kalocsay respondis al la lingvaj bezonoj de la movado en tiu epoko (t. e. intermilita — Red.), tiel Baghy respondis al ĝiaj ideologiaj bezonoj, kaj li elpaŝis kiel simbolo de la homaranismaj esperoj — ho ve! vanaj kaj tre fruaj esperoj! — de militnaŭza, pacon celanta generacio. Tiel longe kiel nia lingvo vivos — eĉ se la homoj de postaj jarcentoj kunportos ĝin al la aliaj planedoj kaj pli malproksimen — la poemoj de Baghy kaj Kalocsay estos legataj kaj amataj, kaj iliaj nomoj estos rememorataj.

William *Auld*, en 1957

En *Preter la vivo* temas pri granda talento, kiu ekvastigis la lingvan kaj enhavan kadron de la Esperanta poezio, kiu kuraĝe montris novajn eblojn kaj per inunde sincera patoso kaj sonora melodieco pruvis denove, ke Esperanto estas lingvo de literaturo.

Drago *Kralj*, en 1960

Tuj dekomence, la publiko lin amis kaj komprenis. Nia tuta generacio vivis en familiara senta alligiteco kun li. La sorto lin konstante molestis, sed alportis ankaŭ kompensojn, kiujn ĝi obstine rifuzis al pli favorataj, al materie pli prosperaj homoj: tre vastan vivantan rondon de fervoraj amikoj kaj admirantoj.

Henri *Vatré*, en 1961

Oni nepre ne nomu lin simpla romantikulo. Ankaŭ kiam temis pri Esperanto mem, li montris sin klarvida, realisma. *Kara mia* — li diris al *Sturmer* en 1929 (kaj kiu ne reaŭdas je tiuj vortoj lian akcentoriĉan voĉon?) — *kredu min, nun, kiam la „interna ideo" en nia movado malplifortiĝas, niaj verkistoj kaj nia literaturo estas plej necesaj. Estas la literaturo, kiu gardas la spiriton de nia lingvo, kiu tenas ĝin viva.* Ke ni posedas tian literaturon, ni en granda mezuro dankas al Julio Baghy.

Victor *Sadler*, en 1967

Memorindaj personaĵoj maloftas en la Esperanta literaturo, sed Baghy kreis unu tian, Miĥaleon *Mihok*. Tiu ĉi personaĵo, kiu aperis en pluraj liaj verkoj, estas pli komplete ellaborita ol iu alia komika personaĵo en la Esperanta beletro, kaj li estas elstara precize, ĉar li estas komplekso de ridigo kaj kortuŝo . . . per Mihok nia aŭtoro kombinas nedisigeble la kontrastajn emociojn, kiel ankaŭ *Ĉaplin* kapablis — ekzemple en la sceno, kie li rolis soldaton kiu manĝas najlojn por ŝajnigi, ke ankaŭ li ricevis manĝopakaĵon dehejme.

John I. *Francis*, en 1968

Baghy estis esence lirika interpretanto de tiu fundamenta homeco, kiu estas la komuna bazo de la internacilingva kolektivo. Pro tio li estas unu el la plej „esperantistaj" poetoj, kiun neesperantisto povas nur malfacile kompreni . . .

Tazio *Carlevaro*, en 1974



Marjorie Boulton

Julio Baghy, la lirikisto*

Julio Baghy debutis kiel lirikisto per *Preter la vivo* (1923), kiu enhavis 71 poemojn; sekvis *Pilgrimo* (1926), kiu enhavis 42 poemojn plus kelkajn prozajn fragmentojn; poste li aperigis volumon pli celantan la ne tre spertajn legantojn en *La vagabondo kantas* (1933) kun subtitolo „Simplaj versoj": 103 poemoj. Poste la lirikisto iĝis relative silenta, kvankam bonaj unuopaj poemoj aperis en gazetoj, ĝis la lirika dramo *Sonĝe sub pomarbo* (1958). En la lastaj monatoj de sia vivo li finpreparis *Ĉielarko* (1966), kiu enhavis salutpoemon kaj 12 fabelojn el la folkloro de 12 gentoj. Kolekton de dise aperintaj poemoj eldonis en 1970 eldonejo Pirato en Osaka sub la titolo *Aŭtuna foliaro.* Bone elektita specimenaro el lia poemaro estas havebla en *Ora Duopo* (1966).

Baghy kaj Kalocsay altigis la nivelon de la Esperanta poezio ĝis plena matureco, kvazaŭ literatura profesieco. Al Baghy mankis, pro la ege malfacila vivo, la vasta klereco kaj mondliteraturaj konoj de Kalocsay; la poemoj de Baghy fontis multe pli el nura propra koro; liaj literaturaj teknikoj estis pli simplaj, malpli elpensitaj, kelkfoje malpli poluritaj. La aminda, verva, varmkora, impulsema personeco de Baghy pli rekte speguliĝis en liaj poemoj. Lia vortmuziko ofte enhavas ian econ de folkloraj kantoj, kaj li estis iasence la ĉefa poeto de la Esperanta popolo. Tamen, iu sugesto pri literatura neadekvateco estus speco de beletrisma mitologio pli ol de kritika vero. Ekde la debuto Baghy brile majstris multajn metrikojn, lerte regis ne nur rimojn, sed multajn aliajn vortmuzikaĵojn: internajn rimojn, eĥojn, asonancojn, onomatopeojn ofte eĉ subtilajn, refrenojn, ripetojn, aliteraciojn; liaj poemoj *preskaŭ ĉiam* havas bonan strukturon, ofte fortajn klimaksojn, ofte ian fortan internan dialektikon, kiu rilatas al la drama kaj aktora talentoj de Baghy; li ankaŭ tre sukcese verkis poemojn por kantado.

La literatura eraro, kiu malbonigis la verkistan reputacion de Baghy, estiĝis el alia estiminda eco lia: lia serioza pedagogia celo, lia konscienco kiel instruisto kaj propagandisto de Esperanto. Laŭ ĝenerala vidpunkto, lia instruista celo kontribuis al lia kolosa servado al Esperanto; laŭ pure beletrisma vidpunkto, li bedaŭrinde oferis sian altan poezian talenton al la bezonoj de postkomencantoj lingvaj. Lia konscienca evitado tiucele de neologismoj ne vere difektis lian poezion; li sukcesis atingi altojn kun tradicia vortaro; sed la rapida verkado de facilaj versaĵoj por kursanoj kaj komplimentoj al kursaninoj ja iom diluis lian poemaron. Tamen eĉ la bagatelaj versaĵoj sen literatura merito ne estas esence nekompetentaj; ekzemple lia ofte deklamita *Estas mi esperantisto* enhavas propran lertecon kaj trafecon.

La temaro de la poemaro estas ĉefe: protestoj pri sociaj malbonoj, pri milito kaj ĝiaj rezultoj; vokoj al pacamo kaj humanismaj idealoj; lirikoj fontantaj el personaj travivaĵoj — amo, amikeco, vojaĝoj, la tre signifa vivoperiodo en Siberio; provoj al vivofilozofio; plus kelkaj bagatelaj, porokazaj poemoj, ŝercoj, kantetoj, kaj la dekdu eminentaj fabeloj. Pluraj el liaj plej bonaj poemoj enhavas draman econ: aparte notindaj estas la majstraj *Antaŭ la Tribunalo* kaj *Post la Batalo;* la profunda *Poeto kaj Muzo* (tragike trafa rilate la tragedian vivon de Baghy); *Tri Fratinoj; La Premio; Nokta Vizito; Infanoj en la Parko; Patrino kaj Filo; En horo de l'Malespero; Post karnavalo;* el kiuj kelkaj eĉ havas dialogan aŭ plurvoĉan formon.

Liaj pledoj pri socia justeco k. s. estas ofte plej sukcesaj, kiam li vekas konsciencon per vivaj bildoj de suferantoj, ekz. *Turmentaj demandoj; Preĝo sur la strato; Ivaĉjo; Ĉe lulilo.* Li kapablas brile sugesti abismojn de homa mizero per malmultaj frazoj. Liaj abstraktaj predikoj estas iom pli palaj; ofte tre taŭgaj por kunvenoj de samideanoj, sed sen la dinamismo de liaj pli konkretaj protestpoemoj. Ĝenerale la pensa enhavo estas pli nobla ol intelekte profunda; Baghy estis valora moralisto, apenaŭ vera filozofo; sed kelkaj el liaj pli profundaj kaj originalaj ideopoemoj ne ricevis la atenton, kiun ili meritas, ekz. *Preĝo al la mortinta Dio; Sklaviĝo* kaj *Liberiĝo;* (ambaŭ eble ne plensukcesaj, sed pense ambiciaj, kaj interesaj rilate al lia pritraktado de kosma temo en *Sonĝe sub pomarbo); Larmoj de Kristo; Patrino, vi blankhara naskintin'; Antaŭ idolo pagana.*

Larĝa estas la gamo de liaj personaj lirikoj, ekde ampoemetoj ŝercaj, eĉ foje milde cinikaj, de flirtemulo kaj kursgvidanta komplimentanto, ĝis teneraj seriozaj

*Artikolo preparita por la aperonta dua eldono de la *Enciklopedio de Esperanto.*

ampoemoj kaj kelkaj tragikaj, ekz. *Dolora deziro* aŭ *Kiam la nokto eterna...* Kelkaj el liaj plej kortuŝaj poemoj estas tre simplaj lirikoj, vere kanteblaj, ekz. *Siberia lulkanto; En lum' mortanta;* kaj, kvankam Baghy multe asertis amon, homecon, humanismon, kelkaj el liaj plej nigrahumoraj poemoj havas emocian dinamismon kaj artan forton, ekz. *Nun migri, ĉiam migri; La Polvohomo meditas.* Kun tenero kelkfoje miksiĝas ia tenera ŝercemo.

Nure ŝercaj poemoj estas alia flanko de la liriko de Baghy, kaj montras sin jam en lia unua volumo, ekz. *Nazo de Athanazo.* Ne havante la virtuozecon kaj la urbanan malnaivon de Schwartz, Baghy tamen kreis kelkajn bonajn amuzajn poemojn, ekz. *Rankvarteto, Tri reĝidoj de l' fabelo, Mi havis nur sep jarojn.*

En la lirika dramo *Sonĝe sub pomarbo* Baghy uzis por la dialogoj tiujn plejparte kvinjambajn versoparojn, kiujn li antaŭ tridek jaroj tiel sukcese uzis en la dialogopoemoj en *Pilgrimo.* Inter la dialogoj troviĝas diversaj lirikaj pecoj en diversaj metrikoj kaj teknikoj; notindaj inter tiuj ĉi estas la komika katalogo de Kazimiro, filo de l' spicisto, kaj la triumfodanca kanto de la Morto.

La lasta poemaro, *Ĉielarko,* verko de tre suferanta, jam mortanta homo, meritas ian apartan pritraktadon, ĉar tie la maljuna poeto subite kaj plensukcese esploras tute novan kampon: iasence pli kulturan poezion, kies literatura fonto estas la tutmonda folkloro. Baghy versigis dekdu fabelojn, kaj ĉiu fabelo havas sian propran etoson kaj tonon, taŭgan formon, ekzotikajn detalojn; sed ĉiuj iom akiris la personecon kaj stilon de Julio Baghy. La fabeloj varias ekde la amuzaj (ekz. *Alo Dino kaj la Edzina Ruzo)* ĝis plene tragikaj (ekz. *Meng Ĉiang kaj Van)* kaj nur du paroj de poemoj utiligas samajn metrikojn. Tiu ĉi libreto ne nur montras, ke la poezia kapablo tute ne velkis en la aĝa kaj malsana poeto — estas nenia necerteco, balasto, mallerteco tie; sed eĉ evidentigas, ke li ĝis la fino daŭre plibonigis sian arton. El liaj kvar poemaroj *Ĉielarko* estas la plej nediluita, la volumo, en kiu malpleje troviĝas nefortaj pecoj, klišoj aŭ sensignifaj versoj. Troviĝas multaj koncize trafaj bildoj, multaj elegante naturecaj esprimoj. Ankaŭ la forta moralemo de Baghy aperas pli oblikve, takte, malpli rekte; kaj oni vidas, ke li povas verse rakonti tre bone, bele konstrui historion. En *Ĉielarko* li kvazaŭ plene interpacigis sian devosenton al postkomencantoj per simplaj kaj interesaj anekdotaj poemoj kaj sian veran poetan konsciencon per la polurita teknika trafeco de la poemoj.

La versformoj, kiujn uzas Baghy, estas treege variaj. Li ĉiam uzas rimojn, kaj tiu disciplino probable helpis lin, tiel ke la granda emocia spontaneeco ne disfalis en senformecon. Li multe uzas ripetojn kaj refrenojn, kaj tre lerte uzas mallongajn versojn melodie; tiaj povas ĉe li esti ne nur melodiaj, sed ankaŭ enhave potencaj, ekz.:

Susura son,
de l' vaga vent,
lule logante bruas...
Al voja ŝton'
nur por moment'
li pro mortlac' genuas...
Alspiras sonĝojn vintra reĝ',
kaj kovras lin per blanka neĝ'...
Kanton funebran korvoj krias...
la korvoj krias.

(Siberia romanco)

MARJORIE BOULTON:

MALAVARA RIĈULO

AL JULIO BAGHY

Nenion havis vi, kaj ĉion donis;
en neĝo Siberia, koro-varmon;
sanigan spriton, respondigan ĉarmon
kie banalaj vivoj monotonis.

Vi venis, kien iu vin bezonis,
kareson donis aŭ kunsentan larmon;
vi amis nin, malican homan svarmon,
amadis daŭre, kiom ajn vi konis,

Nenion havas vi, sed riĉon sentan
posedas vi, disdonas el la koro:
brilajn smeraldojn, vian art-genion;

principojn, ligilaron lumarĝentan;
sinceron, kiu veras kiel oro;
amokuraĝon kiel uranion.

Liaj strofoformoj varias ekde simplaj versparoj aŭ verskvaroj ĝis komplikaj strofoformoj, kies ripetado montras grandan lertecon kaj kapablon vere arkitekture strukturi poemon. Li kelkfoje variigas ankaŭ la strofoformon interne de unu poemo, ekz. *Al homfrato* kaj la lerta omaĝo al Zamenhof, *Sur la Kampo for de l' mondo.* Inter la tre multaj ritmoj, kiujn Baghy provas, la leganto maloftege rimarkas ian stumblon aŭ necertecon.

La granda potenco kaj memorindeco de multaj el la poemoj de Baghy estiĝas el sincera emocia pelo, ia esenca aŭtentikeco de koro kaj kapo; el lia majstra kapablo pri varia vortmuziko; el la fortaj, koncizaj bildoj pri homoj kaj scenoj kaj la drameca vivanteco de la personoj. La plej malnaivaj kaj beletristikaj teknikoj de la poezio estis al li fremdaj. Liaj metaforoj kaj bildoj estas kutime simplaj kiel folklorajoj; tute mankas literatura esoterismo. Li povas foje eĉ verki kliŝe:

... ĉar neniam povas forgesi, kiu amis,
kies koro pro la unua amo flamis.
(Ŝia adiaŭo)

Lia tute vera kaj laŭdinda originaleco estas pli tema, senta kaj esence personeca ol literatureca. Ekzemple, per tre simplaj frazoj li en *Antaŭ la Tribunalo* sciigas al ni la historion de la junulino kaj kondukas nin al la brila klimakso, la pensrenversiĝo de ĝusta pento al justa akuzo. Simile, tre simplaj bildoj kondukas al la amara duobla ironio de la klimakso de *Post la batalo.* Simplaj bildoj, simplaj metaforoj, ofte iom proverbecaj frazoj, enhavas sian propran potencon.

Baghy priskribas iom siajn proprajn poetajn celojn, idealojn kaj sentojn en siaj poemoj *Stranga danco, Poeto kaj Muzo, Mi neniam volis esti de l' poetoj reĝo* (nun iom eksa, ĉar ĝi fontis el la disputo pri neologismoj, kaj dum la lastaj jaroj Baghy mem akceptis plurajn en siajn verkojn) kaj *Por kio vivas la poeto?* Al la lasta demando lia tiama respondo estis: „Por semi amon en la kor'"; kaj la senmorteco de lia poemaro profetiĝis, verŝajne prave, en *Poeto kaj Muzo:*

La kantoj restos, kvankam koro mortas.
Postvivos vin la nomo, sekvos beno
de homoj rifuĝantaj al poemo
de tiu koro ĉiam sanggutanta...

POEMOJ DE JULIO BAGHY

IVAĈJO

Ivaĉjo estis brava kampobubo,
naiva filo de vilaĝa rond'.
En bluokuloj mankis zorgonubo,
neniom sciis li pri l' granda mond'.
La vivon miris li kun pia timo,
kantadis gaje dum la kamplabor'
kaj sur la pajla lito al patrino
biblion legis dum vespera hor'...

Sed venis tempo, mondon detruanta,
kanonoj blekis: buŝ' de l' milit'
kaj lin forrabis tiu buŝ' giganta...
Tre orfaj restis — kampo, pajla lit',
sed li memoris kun kutima pio
pri lastaj vortoj de l' patrin' al fil':
„Ivaĉjo kara, diras la biblio,
armiluzanto mortas per armil'..."

La batalkampo en li miron vekis...
Ne greno kreskis tie, sed grenad',
ne birdoj pepis, sed ŝrapneloj blekis,
ne gaja kanto sonis, sed vead'
kaj ne plugilojn, sed pafilojn premis
la fortaj manoj spasme kun furor'...
Ivaĉjo miris kaj elkore ĝemis:
„Ne de la Dio estas ĉi labor'..."

Li ĵetis for pafilon, bajoneton
kaj senarmile staris en arme'
kaj senarmile ŝturmis drato-reton
kaj senarmile servis en tranĉe'
kaj vanis puno kaj ordon' de l' stabo,
la kapon ĉiam nee skuis li.
Obstine diris la vilaĝa knabo:
„Mi konas nur — dek leĝojn de la Di'..."

Perfido... Mortverdiktis la juĝisto
kaj kvin soldatoj tuj fortrenis lin...
Dum lasta marŝo pensis li pri Kristo
pri la biblia sankta disciplin'...
Ŝtonkoraj kamaradoj... Pastro mankis...
nur ĉirpis kampa gril' tra l' morta mut'...
Ivaĉjo preĝis, Dion psalme dankis,
mildkore iris al la ekzekut'...

Dum ŝargis la soldatoj li subite
ekpalpis ŝarĝon de la panosak'...
En ĝi postrestos pano netuŝite,
patrinfarita pan' el hejma bak'...
Li prenis ĝin, karesis kun kompato...
eklarmis... Kiel peze en la man'!
Ivaĉjo ĝin etendis al soldato:
„Akceptu, frato! Estu via pan'..."

ĈE SAMOVARO

Ĉe malnova samovaro
sidas ruso kaj hungaro.
Dum la akvo zume bolas
la amikoj ekparolas:

„Havi landon en libero,
tamen migri tra la tero,
iri vojon, sed sencelan...
Ĉu vi konas pli kruelan?"

La hungaro ne respondas,
liaj pensoj ĝeme ondas,
viŝas larmon retenitan:
„Havi landon, sed perditan..."

Ĉe malnova samovaro
sidas ruso kaj hungaro.
Dum la akvo bolas zume
ili ploras, ploras kune.

EN LA RIGARDO FLIRTAS MIR'

En la rigardo flirtas mir',
sur lipoj tremas tiklo kisa...
Ĉu pro feliĉ', ĉu pro sopir'
ridetis rave *Mona Lisa*?

Pri la rideto de l' ĉiel'
vekiĝas en mi penso misa;
nu, ĉar ŝi estis nur model',
por mon' ridetis *Mona Lisa.*

POST STRIKO

„Ĉu estas vero, kiun ŝajno maskis?
Venkitaj estas vi. Jen via gloro:
humile nun reveni al laboro
kaj scii tion, ke la strik' fiaskis."

„Venkitaj estas ni — vi prave diris.
Ĉi fanfarono indas al sinjoro.
Por vero ni forsangis, ne por gloro
kaj al batal' ni jam venkite iris.

Ĉar senarmile luktis la korpuso,
dum vin la luksobastion' defendis.
La vero vivas, nur la korpon venkis
stomak' malsata, ve' de l' infanbuŝo."

Tiel instruis Julio Baghy

Estas nur malmultaj esperantistoj, kiuj ne konas la nomon de Julio *Baghy*. Ofte kaj multe oni parolas pri liaj literaturaj meritoj, pri liaj poemoj, prozaĵoj — sed nur malofte kaj malmulte oni mencias lian eminentan kapablon instrui Esperanton.

Mi havis la feliĉon kaj honoron esti lia disĉiplo dum proksimume du jaroj. Ĉi tio okazis jene:

En la 20-aj jaroj la tiama laborista Esperanto-asocio (HESL) en Budapeŝto aranĝis t. n. „superan kurson" por samideanoj, kiuj jam scias Esperanton kaj intencas instrui kaj verki en la internacia lingvo. Tiam mi apartenis al la elektitoj, kiuj povis partopreni en la kurso, kiun gvidis Julio Baghy.

En tiu tempo mi jam konis personе lin — estis malmultaj esperantistoj-movaduloj, kiuj ne renkontiĝis kun li iamaniere. Jam antaŭ la unua studhoro li rimarkis kaj salutis min afable kaj amike, laŭ lia kutimo.

Eble ne ĉiuj scias, ke profesie Baghy estis aktoro. (Li devenis de aktora familio; la aktoreco do estis familia tradicio ĉe li.) La aktoran talenton Baghy povis bone eluzi dum la instruado. Kelkfoje li prezentadis tutajn dialogojn por montri la signifon kaj gravecon de iu gramatika regulo.

Baghy ne nur instruis la lingvon — *li instruis instrui*. Fininte la kurson mi gvidis kelkajn komencantajn Esperantajn lingvogrupojn kaj la rezulto de ili estis samtempe la rezultoj de la instrua maniero de Baghy. Inter la du mondmilitoj mi instruis kelkajn aliajn lingvojn, ĉar tiam pro politikaj kaŭzoj mi ne ricevis regulan laboron. Tiam mi tre bone povis eluzi tion, kion mi lernis de Julio Baghy.

Baghy tre atentis pri tio, ke la disĉiploj estu multflanke instruitaj, vere inteligentaj samideanoj. Multajn horojn okupis la studado de projektoj de artefaritaj lingvoj, kaj Baghy taksis aparte grava la bonan konon de la „klasika" kaj „moderna" E-literaturo kaj de ĝia historio.

Ne nur instrui ni lernis ĉe Baghy, sed ankaŭ lerni. Dum kelkaj studhoroj ni devis klarigi unu al alia gramatikajn regulojn de Esperanto, fari gramatikajn analizojn ktp.

Eble ne necesas aparte mencii, ke ni dum la studhoroj eĉ vorteton ne parolis nacilingve. Mi mem parolis kun Baghy kelkajn vortojn hungare nur post la liberiĝo.

Bone mi rememoras, ke post fino de la kurso ni ne ricevis atestilon pri la scio atingita dum la „supera kurso". Oni laŭtlegis la liston de la finintoj kaj la laborista asocio — HESL — akceptis ilin kiel plenrajtaj Esperanto-instruistoj. Sed post la ekzameno Baghy donis al ni ekzempleron de unu el siaj verkoj. Mi ricevis de li la volumon „Pilgrimoj" kun propramana dediĉo. Ĝis la nunaj tempoj mi gardas ĉi tiun libreton kiel karan rememoron pri Baghy, kiun mi rigardas kiel mian majstron.

Foje li menciis, ke la bona lingvoscio kaj inteligenteco de samideano estas bonaj propagandiloj por la lingvo internacia. Ĉi tio estas ankaŭ mia konvinko.

L. L.

Irena Noiret (kantistino), Kolomano Kalocsay, Alfonso Pechan, Julio Baghy (Nürnberg, 1923)

Julio Baghy:

230 milionoj por la urbo Strutmagen!

Fragmento el la romano Hura!

Vilhelmo Grauer, naskito de la Bagonia ĉefurbo Strutmagen, riĉiĝinte kiel cirka dresisto en Usono, testamentas 230 milionojn da dolaroj al sia naskurbo. Malbeligas la aferon nur, ke li metas kondiĉojn tre malfacile plenumeblajn: unue, la Konsilantaro de Strutmagen devas starigi en la zoologia ĝardeno de la urbo monumenton, kiu figuru la renkonton de Homo al Simio, reciproke manpremantaj; due, la membroj de la Urba Konsilantaro, vestitaj en salonkostumo, ĉiujare devas fari promenadon inter la bestokaĝoj kaj solene meti pajlokronon al la piedestalo de la monumento. La testamento decidas ankaŭ por la kazo, se la Konsilantaro de Strutmagen ne volus plenumi la kondiĉojn kaj rezignus pri la heredaĵo: en tiu kazo oni devos disdoni la grandegan sumon egalproporcie inter la prostituitinoj, vivantaj en la urbo Strutmagen.

La testamento vekas grandegan bruon kaj rezultigas multajn komplikaĵojn. Ĉi-sube ni represas tiun fragmenton de la romano, kiu priskribas, kiel la urba notario, sinjoro Krak — kiun cetere turmentas la peza zorgo trovi edzon por siaj ok filinoj! — iras al la urbestro por informi lin pri la testamento. Ĉar estas ĝuste post-tagmanĝa tempo, la urbestro pace dormas en sia oficejo...

Je la delikata tuŝo de la ĉambristino ekmoviĝis la kolosa korpo.

— Nu, kio?... Kio okazis denove? — La lamenta voĉo kiel vivanta refuto mokis lian imponan eksteraĵon. Ĝi knaris kiel trouzitajn fajfilojn havanta gurdo kaj se li incitiĝis, tiam en neatingeblaj sferoj ĝi singultadis. — Ĉu mia fratino vekigis min? Diru al ŝi, ke ni havas ankoraŭ tempon.

— Sinjoro Jonathan Krak, la urba



notario estas ĉi tie. Nepre li volas paroli kun la sinjora moŝto.

— Diru al li, ke mi tre bedaŭras, sed mi ne povas akcepti lin. Hodiaŭ estos enketo, pli ĝuste bankedo ĉe lia eskcelenca moŝto la financministro kaj mi nun preparas min... Ĉu komprenite?

— Jes, sinjora moŝto, sed...

— Kia *sed?* Ne ekzistas *sed!* Pro la amasiĝinta laboro mi ne scias ja kie estas mia kapo, nu!

— Bone, mi diros, sed laŭ mia opinio li volas paroli pri tre grava afero, ĉar li ŝajnas esti tre incitata kaj kunportis sian skribiston.

— Jes, tiel? Verŝajne, denove tiuj ĉi malbenitaj liberalistoj volas mueli pipron sub mia nazo... Nu, mi finos kun ili!... Enlasu tiun Krak!... Atendu nur momenton, Lida! Kia homo li aspektas? Ĉu liberala?

— Mi ne scias, sinjora moŝto.

— Nu, memkompreneble, kiel vi scius... Sed kial vi ridetas?

— Pro nenio..., sed mi pensis, ke li apartenas al la partio de via sinjora moŝto.

— Jes? Pri kio vi pensas?

— Nu, ili ambaŭ ŝajnas timemuloj.

— Sed diri tion?!... Tuj enkonduku sinjoron Krak!

La ĉambristino eliris. La urbestro eksidis al sia skribotablo kaj ŝajnigis fervoran studadon pri la memorando de la kloakopurigistoj. Estis ja tempo, ĉar la notario kun humila klino jam paŝis en la ĉambron. Sinjoro Jenlafiŝ tuj rekonis en li la senvertebrecon de la urbaj oficistoj kaj kun facila rideto proponis sidlokon al sia gasto.

La notario eksidis. La ĝena devoplenumo ŝvitperlis sur lia frunto. Li forvišis ĝin kaj kun parolatenda respekto fiksis sian rigardon al la vizaĝo de lia urbestra moŝto. Jenlafiŝ ekkompatis lin, rememoris pri la rimarko de la ĉambristino. Fakte, tiu ĉi estas lia partiano. Nur liaj partianoj aspektas tiaj timemuloj. Amikece li metis la manon al la ŝultro de la notario.

— Nu, kio nova, sinjoro Krak?

— Sinjora moŝto, tiu Vilhelmo Grauer, la artisto, mortis.

— Dio donu ripozon kaj pacon al li! Sed tio ĉi tute ne interesas min.

— Al mi estu permesite deklari libere mian opinion, ĉar mi kontraŭdiras al via urbestra moŝto kaj tiun Vilhelmon Grauer mi deziras en la profundan fundon de la fajra infero. Sinjora moŝto, tiu ĉi freneza dresisto, tiu ĉi ekstravaganculo, mankumanta ĉian homan dignon, tiu ĉi naskito de nia amata urbo Strutmagen...

— ...mortis. Tion mi scias — senpaciencis la urbestro. — Ĉu *ni* devos enterigi lin?

— Ho, tute ne! Hieraŭ oni enterigis lin kun tia pompo, je kia havas rajton nur kronprinco. Ne tio estas

la domaĝo! Sed Vilhelmo Grauer estis Amerika civitano, kiu testamentis sian tutan havaĵon: 230, tio estas, ducent tridek milionojn da dolaroj al nia urbo.

— Kioooo? Dudududucenttri... — la surprizita urbestro senvoĉe malfermadis la buŝon kaj impresis kiel grasa siluro sur la bordo. Li energie ekkaptis la dorsapogilon de la seĝo, kvazaŭ li kaptus jam la tutan heredaĵon.

— Jes, du-cent-tridek milionojn da dolaroj.

— Sed homo, la ŝtata kapitalo de la tuta Bagonio ne superas tiun sumon!

— Kion fari? Fakto estas fakto. La reprezentantoj de la Urba Konsilantaro laŭ la deziro de la testamentinto ĉeestis dum la lego de la testamento.

Kazimiro Jenlafiŝ komencis ekscitite kuradi tien kaj reen. Dum momentoj desegniĝis antaŭ liaj okuloj la ĉefurbo, metropoliĝinta sub lia urbestreco kaj li vidis eĉ la statuon, por lia memoro starigitan de la dankema posteularo. Subita kolero ekregis lin.

— Kaj vi kuraĝis deziri en la profundan fundon de la fajra infero tiun ĉi puran bagonan karakteron, tiun ĉi grandaniman patrioton, danke remorantan pri sia patrujo? Sinjoro Krak, espereble vi ne apartenas al la liberala partio, aŭ jes?!

— Dio gardu min! — protestis la timigita notario — sed sinjora moŝto, ankoraŭ vi ne bonvolis finaŭskulti la motivigon de mia antaŭe citita deziro. Tiu ĉi freneza miliardulo ligis la posedeblecon de la heredaĵo al tiaj kondiĉoj, kiaj estas senekzemplaj ne sole en Bagonio, sed ankaŭ en la historio de la tuta kulturmondo. Tiuj kondiĉoj, vangofrapadas la Homaron kaj estas neplenumeblaj.

— Mi ne komprenas. Bonvolu pli detale klarigi!

— Plej oportune, se mi legos por vi la koncernan dokumenton. — Sinjoro Krak prenis la skribon el sia paperujo. Ĝi estis nur kopio, ĉar la originalon transprenis oficiale la urba arĥivisto. — Jen, bonvolu bone atenti!

Donante certan aplombon al gravaj vortoj kaj kritikaj partoj la notario laŭtlegis la testamenton de Vilhelmo Grauer. La urbestro variigis sian koloron. Li fartis kiel tiu, sub kiu oni fortiradas la tapiŝon. Ne sole la forruliĝantaj dolaroj zigzagis antaŭ li, sed li aŭdis eĉ la piedknaradon de la urbestra seĝo. Li paliĝis. Ne, tiu ĉi dokumento ne estas publikebla kaj provizore estas necese prisilenti ĝin. En tiu momento responde eksonis hurlo raŭka de kolportisto: *„Heroldo de l' Popolo"... Eksterordinara eldono!... Testamento de Vilhelmo Grauer... Ducent tridek milionoj da dolaroj al la urbo Strutmagen...* Ĉirkaŭ la kapo de Kazimiro Jenlafiŝ vagadis tiu certa afero, kion al li ofte deziris liaj malamikoj.

La notario finis la legadon.

— Sinjora moŝto, kiel vi povas konstati, la afero estas tre serioze konsiderinda. La du subskribintoj, kiel atestantoj, estas amerikaj civitanoj, kiujn ni ne povas akuzadi, pridubi sen diplomatia konflikto kaj la heredaĵon, gardatan en la plej bonfama banko de New York, ni ne povas konfiski.

Sceno el „Maskobalo" (Lirika sceno kun kantoj de Julio Baghy. Muziko de Mihaelo Sárosi.) Personoj: Piero: M. Sárosi. Pierino: Anna Pechan. Kelnero: Julio Baghy. En Univ. Kong. de E., Nürnberg, 1923. 08. 02. Teatra vespero de Literatura Mondo.

JULIO BAĢHY:

ESTAS MI ESPERANTISTO

Verda stelo sur la brusto
iom palas pro la rusto.
Mi ne estas purigisto;
estas mi esperantisto.

Kuŝas ie sub tegmento
„Netuŝebla Fundamento".
Tuŝu ĝin nur la Mefisto;
estas mi esperantisto.

Polvkovrite sur bretaro
putras mia SAT-vortaro.
Tedas min la vorto-listo;
estas mi esperantisto.

Gramatikon mi ne konas
kaj gazeton ne abonas...
Librojn legu la verkisto;
estas mi esperantisto.

Mi parolas kun rapido:
„Bonan tagon! Ĝis revido!"
Ĉi sufiĉas por ekzisto;
estas mi esperantisto.

Pionirojn mi kritikas,
la gvidantojn dorne pikas
kaj konspiras kun persisto;
estas mi esperantisto.

Se baraktas en la krizo
la movado, organizo,
helpas mi nur per rezisto;
estas mi esperantisto.

Flugas per facila vento
el la buŝo Nova Sento.
Ĝi sufiĉas por sofisto;
estas mi esperantisto.

Post la mort' ĉe tombo mia
staros „rondo familia",
nekrologos ĵurnalisto:
estas mi esperantisto.

— Ho, ke la fulmo estus trafinta la tutan aferaĉon!

— Identan opinion mi havas la honoron esprimi koncerne la aferon.

— Sed nepre ni devas trovi ian elirvojon — incitite ekkriis la urbestro. — Tiom da mono oni ne ĵetas tra la fenestro! Hodiaŭ vespere bankedon aranĝos lia ekselenca moŝto la financministro. Pro tiu ĉi neatendita intervenaĵo, tre verŝajne, la bankedo fariĝos enketo. Mi fidas plene la genion de lia ekscelenca moŝto Tobio Akapar.

— Ne estas permesate forgesi, sinjora moŝto, ankaŭ tiujn sekurigajn aranĝojn, kiujn entenas la testamenta klaŭzo. Bonvolu rememori pri la antaŭe legitaj! La kontrolo pri la plenumado de la testamentitaj kondiĉoj estas komisiita al la prokuroro de tiu banko, en kies sefo n-ro 135, ŝlosita kaj sigelita de Vilhelmo Grauer mem, estas gardata la grandioza heredaĵo. La sefo estas asekurita ĝis plena valoro de la sumo testamentita kontraŭ ŝtel-sigelrompo kaj brulo kaj tiel la vivekzisto de la asekura socieo dependas de tio, ke la sefo ne estu malfermita antaŭ la limtago. Tiu ĉi limtago koincidas kun la limtago de la plenumotaj kondiĉoj. Ni vicigu la konsekvencojn! Unue, la inventariado de la heredaĵo estas malhelpita; due, se dum la limigita tempo ne estos plenumitaj la kondiĉoj, rajtigantaj la posedeblecon de la heredaĵo, la tuta grandioza kapitalo transiros en la ŝtatan kason de Usono. Kaj ni ne forgesu pri la filo de la testamentinto, pri Cezaro Grauer.

— Kiooo? Eĉ filon li havas? La testamento tute ne mencias lin.

— Jen, ĝuste tio mirigas min pleje. Sed tiu ĉi forgeso, fakte senheredigo komplikas la situacion. Laŭ la heredleĝo la senheredigita infano havas rajton procesi kontraŭ la testamento, escepte, se la infano jam estis kontentigita, rekompencita dum vivo de la gepatroj. Nun la demando, ĉu Vilhelmo Grauer rekompencis jam la filon dum sia vivo?

— Kolose! Piramidale! — Kazimiro Jenlafiŝ entuziasmis pri sia subita ideo kaj tiel forte ekskuis la notarion, kvazaŭ li estus volinta forigi la animon el li. — Homo, aŭskultu! La prostituitinoj estas solvitaj!

— Kikikieeel? Mi ne komprenas... Solvitaj??!

— Aŭskultu homo! La filo procesos kontraŭ la testamento, por ke li povu ricevi sian parton, laŭleĝe certigitan. Sed la urbo grandanime rezignos pri la tuta heredaĵo kaj sekrete konsentos kun la juna Grauer, kiu kiel rajta posedanto redonos la duonon de la heredaĵo per donacdokumento al la urbo. Ne estos proceso, nek perturbo. Nu, kiel vi opinias? Kolose, ĉu ne?

— Bedaŭrinde, mi devas deklari kontraŭopinion al tiu de via sinjora moŝto, sed tion mi faras kun respektoplena bedaŭro. Jen, miaj argumentoj: unue, ĉar la juna Grauer ŝvebas inter vivo kaj morto en nia plej bonfama sanatorio; due, ĉar li volas aŭdi nenion pri la heredaĵa afero, malbenas la memoron de sia patro, aŭ alivorte li rezignis pri sia heredrajto; trie, ĉar se la urbo mem rezignos pri sia rajto, kiun certe ne volonte faros, tamen restos la rajto de la prostituitinoj, loĝantaj en la urbo Strutmagen kaj ili procesos; kvare, ĉar...

— Sed tio ja neebla! Ĉiu aparte ne povos fari tion?

— Ili organizos sin en socieo, havanta statuton kaj ilia prokuroro...

— Harstariga teruro! La prostituitinoj, kiel morala korporacio! Frenezaĵo!

— Do, kvare, ĉar eĉ la persvado ne havas racion ĉe la juna Grauer, la vicordo de heredo restos ja: la urbo, la prostituitinoj, aŭ Usono mem en kazo de plena rezigno. Ĉu vi bonvolas kompreni la situacion? Konsiderante ĉion ne estas racie, se la urbo rezignus, se oni persvadus la junan Grauer, se la prostituitinoj rezignus, ĉar Usono forglutos la nemezureblan heredaĵon, signifantan por ni grandiozan prosperon...

Baghy en aŭskultantaro dum prelego

Vilmos Benczik:

*La prozo de Julio Baghy**

La unua proza volumo de Baghy — la romano *Viktimoj* — aperis en 1925, du jarojn post lia debuto kiel poeto. Poste sekvis la novelaro *Dancu, marionetoj!* (1927) kaj du jarojn poste la miksita kolekto *Migranta plumo* (1929). En 1930 aperas denove romano de li, la ampleksa *Hura!*, kaj ankaŭ la jaron 1931 signas romano, eĉ se mallonga: *Printempo en la aŭtuno*. Post ioma paŭzo en 1933 eliras du prozaj verkoj de Baghy: la romano *Sur sanga tero,* kiel daŭrigo de *Viktimoj*, kaj la volumo *Verdaj Donkiĥotoj*, entenanta la romaneton *Paŭlo Paal* kaj kelkajn primovadajn satirojn. *La teatra korbo* (1934) estas kolekto de skizoj, kaj la populara kurslibreto *La verda koro* estas verkita en formo de romaneto. La lasta prozvolumo de Baghy estis *Koloroj* (1960), novelaro, kiu enhavis nur pecojn pli frue aperintajn en revuoj.

La proza verkaro de Baghy vekas respekton jam per sia amplekso, ja pli frue neniu originala prozisto publikigis tiel multnombrajn verkojn; ĝian atentindecon substrekas la fakto, ke liaj verkoj rapide trovis publikon, kaj kelkaj el ili eĉ publikiĝis plurfoje. (*Viktimoj* publikiĝis la duan fojon en 1930, triafoje en 1938, kaj la kvaran fojon — kunbindita kun *Sur sanga tero* — en 1972. *La verda koro* reeldoniĝis en 1965, *Printempo en la aŭtuno* en 1972.)

Tiu ĉi popularеco unuflanke estas studinda kaj prijuĝinda fenomeno, kaj aliflanke — senkonsidere al la rezultoj de tiu studado kaj prijuĝado — ĝi havas gravan signifon en la evoluprocezo de la originala prozo, ja efektive la romanoj kaj noveloj de Baghy kreis vastan legantaron por originalaj prozaj verkoj.

En kio konsistas la granda popularеco de la Baghy-romanoj, precipe de tiuj, kiuj pritraktas la Siberiajn travivaĵojn de la aŭtoro? Verŝajne pravas I. *Lapenna* (*La Internacia Lingvo*, p. 54), kiu substrekas la signifon de tio, ke Baghy — diference de siaj antaŭuloj — ĉerpas rekte el siaj vivospertoj kaj rakontas fortimpresajn historiojn. La pli fruaj romanistoj ne tiel faris: *Vallienne* emis al tro neverŝajnaj situacioj kaj lia lingvaĵo kelkloke lamis; *Luyken* tro didaktike predikadis: liaj figuroj estis ne nur ne verŝajnaj sed ankaŭ anemiaj, kaj lia historioteksado tre malrapida. Vere, la moralfilozofia predikado ĉeestas ankaŭ en la verkoj de Baghy, tamen ĉi tie ili aperas en kadro de viglaj historioj, en kiuj rolas foje-foje majstraj epizodfiguroj kaj protagonistoj, en kiuj abundas — ne malofte eĉ tro — la sango, sed ili neniam estas anemiaj.

El la du pri-Siberiaj romanoj la unua, *Viktimoj*, multrilate surhavas la stampon de la debuto. La aŭtoro volas enŝovi en ĝin sian tutan mondrigardon, kaj pro tio la figuroj ofte iom ŝvite konversacias: ne tiom por komuniki ion al la kunparolanto, ol al la leganto. La figuroj estas iom neverŝajnaj, krom tiu de Izor *Steiner*, kvankam lia figuro ne malhavas trajtojn, kiujn nur la konvencia pensmaniero atribuas al judoj. Malantaŭ la duon-dia figuro de la protagonisto, Johano *Bardy* — kiu estas fakte la aŭtoro mem —, la granda historia evento de la epoko, la rusa civitana milito estas nur fono. Menciindas, ke la konstruo de la romano sekvas dramaturgian skemon; la tuto estas sinsekvo de

Baghy inter siaj lernantinoj

*Artikolo preparita por la aperonta dua eldono de la *Enciklopedio de Esperanto.*

scenoj kaj la rakonta elemento servas nur kunligi tiujn.

Sur sanga tero estas jam multe pli bonkvalita verko: ĉi tie la konstruo estas pli epika — la aŭtoro nomas ĝin „mozaik-romano" —, kaj nur la ĉefaj figuroj konservis la abstraktecon, kiun ili havis en *Viktimoj.* Pro ili bone kompensas la trafaj epizodfiguroj, kiel Miĥaelo *Mihok; Podenko,* la „kolbaskolonelo"; la ĉino *Lio Fu Peng; Karesev,* la kozakserĝento kaj aliaj. En *Sur sanga tero* la revolucio kaj la civinata milito ne plu estas nura fono de la agado, sed ĝi estas mem la temo: la monda ekonomia krizo inter la jaroj 1929—1932 certe fortigis la interesiĝon de la aŭtoro pri sociaj kaj politikaj problemoj. Legante la sam-temajn novelojn de I. *Babel* kaj spektante la aklamitan filmon de M. *Jancsó: La Internaciistoj,* oni devas konstati, ke Baghy ne estis malbona observanto.

Siberiajn travivaĵojn prilaboras ankaŭ la romaneto *La verda koro,* sed pro sia porkursa destino ĝi ne estas konsiderebla literatura verko.

Inter la du pri-Siberiaj romanoj aperis du alitemaj Baghy-romanoj: *Hura!* kaj *Printempo en la aŭtuno.*

Sendube la pli atentinda el la du estas *Hura!,* kiu-kvankam verkita ekspresrapide, nur dum unu monato — ampleksas pli ol 400 paĝojn. La baza ideo estas bonega: mizantropa orfeona* dresisto testamentas 230 milionojn da dolaroj al la ĉefurbo de imagita lando Bagonio. Sed li metas tre pezajn kondiĉojn: la Urba Konsilantaro devas starigi monumenton, kiu figuru la renkonton de Homo al Simio, reciproke manpremantaj, kaj la konsilantaranoj ĉiujare unu fojon devas salonvestite promenadi inter la bestokaĝoj kaj solene meti pajlokronon al la piedestalo de la statuo. (Konsiderante, ke tiu ĉi romano de Baghy aperis en la jaro 1933 germanlingve, ne maleblas, ke ĝi donis la ideon por la fama dramo de F. *Dürrenmatt: La vizito de la maljuna damo.)*

Tiu ĉi romano tre bone respegulas fortajn kaj malfortajn flankojn de la aŭtoro. La unua parto de la romano estas brila socia satiro: la priskribita de li Bagonio multe similas la tiaman Hungarlandon, do ĉi tie li *priskribas* ion, kion bone li konas. Male, en la dua parto li eltrovas figurojn por ilustri siajn moralfilozofiajn teoriojn, sekve li devus priskribi ĉi tie ion, kion li ne nur ne konas, sed kio simple ne povas ekzisti. Kaj ĉe tia entrepreno tre malofte sukcesas verkisto. La malfortecon de la dua parto pli emfazas la fakto, ke la aŭtoro — kvazaŭ ne fidante je la efikpovo de siaj ideoj — multe ripetas sin, kaj pro tio la agado eĉ strukture perdas sian elanon.

La novelo *Paŭlo Paal* — kiu aperis en la volumo *Verdaj Donkiĥotoj* — estas ne pli ol naiva legaĵo, kiu ne eltenas la komparon kun la ceteraj Baghy-verkoj.

La noveloj okupas ne malpli gravan rolon en la proza verkaro de Baghy, ol la romanoj. Ankaŭ sur tiu tereno li estis pioniro, ja *Dancu, marionetoj!* estis la unua vere bona novelaro, verkita en Esperanto. Ĝi enhavas ok pecojn, inter kiuj elstaras *Nur homo* (nomebla prefere rakonto, ja ĝi ampleksas 50 paĝojn), *Kiel Mihok instruis angle* kaj *Tri kamaradoj.* En la kolekto *Migranta plumo* aperas entute naŭ prozaj pecoj, kaj inter kelkaj poemoj tri unuaktaj teatraĵoj. Ankaŭ en tiu ĉi kolekto troviĝas bonaj noveloj, kiel *Nigra Kristnasko,* priskribanta la morton de juda knabeto, *La ŝuflikisto* kaj *Sinjoro Melonkapo.*

La teatra korbo fakte ne estas novelaro: la aŭtoro mem subtitolas ĝin „senpretenda babilado". En 1934 Baghy jam estis aklamata personeco, do li jam havis la pozicion rekte babiladi kun la legantaro, sen elpensi pretekste historiojn. Videble li ĝuas tiun situacion, ja li ĉiam estis unuavice profeto, kaj nur duavice verkisto. En tiuj pecoj la devo de historiteksado ne ŝarĝas lian paciencon, kaj lia plumo kuras facile, sen spasmo, kaj el tio kreiĝas almenaŭ du atentindaj skizoj: *Kontrastoj* kaj *Pala romantiko.*

Koloroj enhavas ĉefe novelojn, kiuj aperis pli frue en revuoj, plejparte en *Literatura Mondo, do* ili kreiĝis antaŭ 1950. La nivelo de tiu ĉi volumo estas malpli ondanta, ol tiu de la ceteraj, tamen inter elstaraj pecoj, kiel *Servo S. R. K.* kaj *Kancero de animo* troviĝas ankaŭ malfortaj verkoj.

La malvirtoj de la noveloj de Baghy ĉefe fontas el tio, ke la aŭtoro konsideras la historion nur ilustraĵo por certa morala aŭ filozofia tezo. Ofte okazas, ke li ne sukcesas trovi vere realan, kredindan historion por ilustri sian direndon, aŭ, eĉ se la baza ideo estas bona, li ne havas paciencon por zorge konstrui la historion. Pro tio okazas, ke liaj figuroj ŝajnas nuraj marionetoj, kies movŝnuroj ne estas bone kaŝitaj, eĉ foje-foje videblas ankaŭ la mano de la manipulanta artisto. Nur malofte li verkis vere epike: li estis esence poeto, kaj antaŭ ĉio dramisto. Multaj liaj prozaj verkoj estas plie prozpoemoj, ol noveloj aŭ rakontoj. Lia novelarto kulminas en tiuj pecoj, en kiuj li sukcesas trovi kaj konstrui historion adekvatan por la baza morala-filozofia penso.

Lia lingvaĵo estas vigla, viva, kio siavice estas natura, ja li vivis konstante inter esperantistoj. Koncerne lian lingvan konservativemon la bruo estis superflue granda, ĉar li tute ne estis lingva simplisto. Liaj frazoj estas riĉe ornamitaj, tamen rapidaj, bildriĉaj, liaj lingvaj turnoj trafaj. En la komencaj verkoj makulis lian stilon kelkaj hungarismoj, kiuj tamen ne tre ĝenas.

La estetikaj kvalitoj de la proza vivoverko de Baghy ne tiom ravas, se oni rigardas la verkaron en mondliteratura medio, sed tion kompensas ĝia literaturhistoria utileco kaj valoro, aludita komence de la artikolo. Liaj romanoj kaj rakontoj, kiuj respondis — kiel prave konstatis Auld — al la ideologiaj bezonoj de la intermilita esperantistaro, helpos plu teni tiun gravan funkcion: ekŝatigi Esperantan literaturon eĉ al tiuj, kiuj antaŭe opiniis, ke E taŭgas nur por praktikaj celoj, sed ne por literaturo.

**orfeono* (el nomo de Orfeo): varieteo.

Kia estis...? Poemo de Frigyes Karinthy

Kia estis ŝia blondo, mi ne sciis,
sed scias mi, la kampoj flavaj ondas
ĝiskoriĉe, se sonoras arel' radias...
En tiu blondo Ŝi en mi reondas.

Bluon de okuloj ŝaj mi ne sciis,
sed, se ĉiel' alteras nubon fendas,
kiam la septembra ĉin' melankolias,
en tiu brila blu' mi Sin resentas.

Pri silkec' de ŝia vizo mi ne sciis,
sed, se printempe ĝemas kampo flora
sentas mi, ke voke al mi Anna Kolias
tra l' spac' senlima el printempo fora.

Tradukis:
Julio Baghy

Gyula Csák:

Balado pri la pano kaj cirko

Memore al oĉjo Elek Szálldobágyi

Kvindeko da falĉistoj staras en la foirejo dum varmega somera aŭroro de la 1932-a jaro de la Sinjoro,

kaj atendas alvenon de la sinjoroj, por ekscii la ordonon, laŭ kiu ili devos lokiĝi ĉi tie aŭ tie ĉe randoj de tritikokampoj,

por rikolti la Vivon, kies grandan parton la sinjoroj kolektas en grenejoj, sed eta parto fluetados ankaŭ al la falĉistaj familioj — laŭ konataj kaj tre malnovaj reguloj de la disdivido.

Tamen ne estas la sinjoroj kiuj alvenas unue sed la ĝendarmoj, kaj ili viciĝas je dudekkvin-dudekses paŝoj unu de la alia, kvazaŭ formante ĉenon ĉirkaŭ la falĉistoj,

kaj ili gapadas en truon de la aero kvazaŭ mutaj, sed admonaj krisignoj de la potenco,

eĉ por la trezoro de la tuta mondo ne rigardus iun-tiun kamparanvizaĝon,

ĉar laŭordone la amaso estas senvizaĝa,

la amaso havas nur forton kaj direkton, kaj tiujn oni devas egalpezigi per forto kaj direkto de la potenco, atentante pri primareco kaj supereco de tiu lasta: ĉu komprenite? finite!

Poste venas la sinjoroj en kaleŝoj, kaj kune kun ili ankaŭ kelke da sinjorinoj, kiujn la scivolemo forpelis el la molaj litoj je tiom frua aŭroro

ĉar disfamiĝis, ke Steĉjo intencas ion,

kaj Steĉjo estas granda petolulo, ege riĉa, granda dando,

kies galantaĵoj kaj pikantaĵoj ĉiam tremetigas la virinajn korojn.

La sinjoroj ankaŭ estas scivolemaj, sed alie ol la virinoj: scivolemo miksita kun angoro kaj timo,

ĉar ĉu estas ĝendarmoj, ĉu ne: multaj estas ĉi-kune la falĉistoj.

Precipe la pli aĝaj kaj saĝaj scias: multaj estas ĉi-kune la falĉistoj. Vane ŝajnas ili magraj, kurbaj, la rigardoj hundhumilaj,

iliajn kuraĝon, forton, malrespekton terure potencigas la malespero, ĉar en dua semajno de la rikolta sezono

ili ankoraŭ ne povis faligi tritikon en vicojn, ankoraŭ ne povis levi siajn sakojn por enigi kelkajn kilogramojn da tritiko, por ke anstataŭ la pastaĵoj kaj farunaĵoj faritaj el mucida maizgrio, ili denove el tritiko baku la panon.

Mankas laboro.

Kaj la pli aĝaj kaj saĝaj sinjoroj scias, ke ĝi eĉ plu mankos. Bezonatas malmultaj falĉistoj, ĉar la tritikon de sinjoroj jam maŝinoj falĉas — kaj kamparanoj ne havas semaĵon.

Sed jen: venas Steĉjo! Li eliras ĉemizmanike el la kazino, ĵus lasinte kartludon kaj absintaĵon, akompanate de simile kartludemaj kaj absintaĵemaj

sinjoroj, kiuj tamen ekhaltas ĉe la ĝendarmoĉeno, kaj unue stulte, poste sobriĝante pro la freŝa aŭroro, kun ĉiam pli streĉa atendemo fiksas la okulojn sur Steĉjo,

kiu ekpaŝas inter la malfermiĝantaj kamparanaj vicoj kaj marŝas moŝtece, mute — kvazaŭ en armerevuo.

Bela viro. Alta, bruna, kun migdal-okuloj, fortika mentono, ŝultroj fortikaj, sur la frunto kvazaŭ diademo brilas la inteligento.

Li marŝadas kapklininte: liaj paŝoj frapas ritme kaj peze la pavimitan foirejon,

baldaŭ subite ekhaltas, vokante la falĉistar-estron.

Moviĝas la senorda amaso, kaj antaŭenpremas sin malalta, sed fortika viro, kaj raportas, ke li estas

Elek *Szálldobágyi*, kiu humile atendas la respektivan ordonon: kie sur tritikokampoj ili eklaboru?

Steĉjo montras malsupren, la pavimon.

— Ĉi tie.

— Ĉi tie?

— Ĉi tie.

La kamparano ne komprenas, demande algvatas la kompanojn, sed ili same ne komprenas.

Bonvoleme ridetas Steĉjo, ĉar li ja komprenas, kial tiuj ne komprenas lin. Kiel ili kapablus kompreni, ili ja ne havas imagpovon!

Do li eksklarigas, kvazaŭ predikas, ke oni devas rigardi la foirejan pavimon, kvazaŭ ĝi estus nigra fekunda grundo, kun flaviĝanta, ondiĝanta tritikokampo.

Kvazaŭ, kvazaŭ . . .

Tial ili komencu la laboron, ekstaru ĉe rando de la grundo, svingu la falĉilon, kvazaŭ ili fakte falĉus;

la salajro ne mankos, same se ili falĉus veran tritikon.

Interkonsiliĝas la ĉefkamparanoj, poste kapjesas la deziron de Steĉjo: ili rikoltas la ne-tritikon, se poste estos la vera tritiko.

Szálldobágyi suspiras peze, elsvingas la falĉilon, eklaboras kun mezurateco;

post li la aliaj, stumble, plumpe, sed ĉiam pli akurate, tiel, kiel decas fari somere, kiam falĉistoj kunlaboras.

Kaj la vidaĵo: mirinda!

Kvindek falĉistoj falĉas la nenion.

Poste Steĉjo plu poluras ilian imagpovon,

komandante, ke foje-foje ili akrigu la falĉilojn, kvazaŭ falĉus veran tritikon;

komandante, ke ili kantu, kiel al gajaj rikoltantoj decas.

Tremetas maljunega kamparana voĉo: *Anas' kovas apud junko, Tritik' kreskas en ĉi grundo* . . . Sed Steĉjo trovas la kanton malrapida, li preferas tion, ke *Kan-tegmenta la kaban', forbrulis pro arda am'* . .

Mirinda vidaĵo.

La ĝendarmoj malstreĉiĝas, ekrikanas.

Sub lipharoj la sinjoroj malice grimacas.

Gracie ridetadas kaj aplaŭdetadas la sinjorinoj.

Leviĝas la suno, ĝi ankaŭ gapas ĉi-direkten.

Leviĝas la urbo, la famo vokas milojn ĉi tien, ili ĉirkaŭstaras kaj ridegaĉas.

La foirejo ŝanĝiĝis en arenon. Baldaŭ knabineto ekklukas: kaj kie tardas la garbistoj?

Steĉjo alvokas la infanon, kisas al ŝi la frunton, ĉar jen: ŝi havas imagpovon, kaj li ordonas, ke

ĉiun falĉiston sekvu garbistoj. Virinoj eklaboras por duonporcio, ili kliniĝadas inter la ekbriletantaj falĉiloj, dume la pavimo varmiĝas, igas ilin rapide levadi la senŝuajn piedojn, kio

aldonas novan eron al la ridindaĵoj.

La foirplaco fariĝas grandega ridaĉanta maro, belega kaj feliĉa estas tiu hodiaŭa tago. Venu, nia Sinjoro, la Sankta Spirito! Hodiaŭ estas la granda tago de Steĉjo.

La torturito — Kapo el la serio de János Kass

Jam ankaŭ la sinjoroj senbride ridegas, forviŝante la larmojn.

Kaj svigandas la falĉilon oĉjo Elek Szálldobágyi, kaj faladas liaj larmoj sur la pavimon, kaj li vidas, ke ĉiuj larmeroj ekfloras en floron,

kaj la placo jam grandega bunta herbejo estas, kie sinjoroj staras en vico kvazaŭ tritikospikoj,

kaj la kvindeko da falĉistoj faligas ilin per falĉiloj, kaj jam ĉiu el la floroj ruĝas sangumita,

kaj ĉiuj rikanoj sufokiĝas — en morta stertorado.

Tion pensas la maljunega Elek Szálldobágyi, ĉar ankaŭ al li donaciĝis iom da imagpovo.

Tradukis: *Zsuzsa Haszonits—Varga*

Literatura metiejo

Trafa traduko

En la 1976/6-a numero de HV sur la paĝo, kie estis publikigitaj klasikaĵoj de Esperanta tradukarto, aperis nova nomo: Béla *Hules*,* kiel tradukinto de „porinfana" poemeto de hungara poeto Sándor *Weöres**. Ĉu meritis la malgranda verko tiom da honoro?

Por la hungaraj legantoj, se ili vidas paralele la originalon kaj la tradukon, la respondo ne estas duba. Al la eksterlandanoj mi strebas iom klarigi tion.

Laŭ la vers-estetiko de Sándor Weöres la tiel nomata porinfana literaturo devas esti ĝuebla ankaŭ al plenkreskuloj, ĝi devas do havi la nivelon de „granda" literaturo. Tio validas ankaŭ en la kazo de tiu ĉi dustrofa poemeto, en kiu intermiksiĝas la infaneska ludemo kun la perfekte arta aperigo de la bazara atmosfero. Ni aŭdas la voĉon de elkriisto, la tamburadon, la murmuron de hundoj. Kaj ĉion ĉi en vere poezia formo. Ni legu paralele la originalon kaj la tradukon, kaj la hungare ne sciantaj legantoj rigardu ankaŭ la laŭvortan tradukon de la verko!

A KUTYA-TÁR

Harap utca három alatt
megnyílott a kutya-tár,
sippal—dobbal megnyitotta
Kutyafülü Aladár.
Kutya-tár! kutya-tár!
Kutyafülü Aladár!

Húsz forintért tarka kutya,
tízért fehér kutya jár,
törzs-vevőknek öt forintért
kapható a kutya már.
Kutya-tár! kutya-tár!
Kutyafülü Aladár!

HUNDBAZARO

Marde en la strato Mordo
malfermiĝis Hundbazar',
per tambur' ĝin inaŭguris
Hundorela Baltazar'.
Hundbazar'! hundbazar'!
Hundorela Baltazar'!

Bunta hundo ok forintojn,
blanka kostas nure kvar,
eĉ por du forintoj estas
jam hundeť por klientar'
Hundbazar'! hundbazar'!
Hundorela Baltazar'!

La laŭvorta traduko: En la strato. „Mordas" numero tri / malfermiĝis la hundejo, / per fajfilo-tamburo inaŭguris ĝin / Hundorela Aladár. / Hundejo! hundejo! / Hundorela Aladár! / Bunta hundo dudek forintojn, / blanka hundo kostas dek, / Klientoj jam por kvin forintoj / povas aĉeti hundon. / Hundejo! ktp.

Nun ni transiru al la detala analizo! Se oni legas la du unuajn versojn, kaj en la originalo kaj en la Esperanta varianto aŭdas la konsonanton „r", kiu eble plej bone transdonas la voĉon de hundoj: „Harap utca három alatt megnyílott a kutya-tár" — Marde en la strato Mordo /malfermiĝis hundbazar'. Eĉ aparta gajno de la traduko estas la esprimo *„hundbazar"'* anstataŭ „hundejo", ne nur tial, ĉar ĝi pli bone rimas, sed ankaŭ tial, ĉar tiu ĉi vorto pli konvenas al la menciita „bazara" kaj „hunda" atmosfero de la poemeto. La ĝuantoj de la poezio devas esti kontentaj ankaŭ pri la brila aliteracio: *mar*de-*mor*do (komp. *har*ap-*hár*om).

La sekvaj du versoj havas ian perdon, ĉar la tradukisto „ne povis" trovi la adekvatan Esperantan esprimon al la vorto *„sippal—dobbal"*, kiu en la hungara estas frazeologia vortkunmeto kaj ankaŭ havas la atmosferon de la bazaro. Sed ĝuste tio estas en la vorto *„hundbazar"'*, kiu figuris en la antaŭa verso. Cent procenta solvo estas la nomo *„Hundorela Baltazar"'*. Unue: la nomo Baltazaro sonas pli Esperante ol Aladár, due: la vortludo *hundbazar'* — *Hundorela Baltazar*, riĉigas la tradukon.

En la Esperanta varianto de la dua strofo B. H. aliigas la prezojn de la hundoj, sed tio tie ĉi havas nenian signifon. Tamen la sonado de la versoj estas denove „hunda": „Bunta hundo ok forintojn, / blanka kostas nure kvar..." — „Húsz forintért tarka kutya, / tízért fehér kutya jár..."

Antaŭ nemulte da tempo mi legis intervjuon kun vere multescia hungara lingvisto, kiun mi alte estimas. Li favore opiniis pri Esperanto, sed dubis: ĉu „arta" lingvo povas transdoni la etoson de tn. „tradiciaj" idiomoj. La samopiantoj forgesas: la etoson lingvo havas unuavice ne pro siaj tradicioj, sed tial, ĉar la signifo kaj la sonado de la vortoj havas ian emocian flankon. Tio validas ankaŭ en la kazo de Internacia Lingvo. Ankaŭ la esperantistoj sciantaj bone-malbone nian lingvon, pensas ĝin nekapabla esprimi la tutan skalon de homaj pensoj kaj sentoj. Tial ili kontentiĝas en la literaturo pri malperfektaj solvoj.

Se oni legas klasikulojn de la Esperanta literaturo originala kaj traduka, devas tuj kompreni la malpravon de la menciitaj opinioj kaj verkadoj. Ankaŭ pri tio atestas la verko de Béla Hules.

Konklude: ni devas esti minimume maksimumistoj.

Péter *Rados*

*legu: Bela Huleŝ, Šandor Vereŝ

Barbara Sokalówna

La hedero

Mi ne plu memoras, kiu donacis al mi tiun planton. Onklinjo Eva? Iu kolegino el mia oficejo? Ne gravas. Mi ricevis ĝin jam sufiĉe grandan kaj tre belan. Granda — ne, tio ne estas bona vorto. Prefere — longa. Ĝi tuj dislokiĝis laŭlonge de unu vando, poste ĝi rampis sur la dua kaj la tria, ĝis ĝi atingis la muron, apud kiu staris mia lito. Mi havis en mia ĉambro vivantan, verdan ĉenon. Tre rapide mi komprenis, ke ĝi ne estis simpla planto. Ĝi sĉipovis paroli. Iun vesperon, kiam, tre laca mi jam ekdormetis, mi aŭdis softan ĝemon. La sono estis stranga. Mi kaptis ĝin ne per oreloj, sed kvazaŭ rekte per la cerbo. Mirigita, mi atendis momenton. La ĝemo aŭdiĝis denove. Mi leviĝis kaj tuŝis la poton de mia hedero. La tero estis tre seka. Mi forgesis surverŝi ĝin. — Ho, pardonon — mi murmuris. Mi trinkigis mian planton kaj ĝi dankis al mi. Mi ne nur aŭdis tion. Mi preskaŭ vidis kiel el ĝiaj folioj, el la rampiloj eliĝas gracia dankesprimo. Mi eksentis kortuŝon. Ho, admirinda planto! Eble ĝi alportos al mi bonŝancon? Fakte, tiel okazis. Printempe mi ekkonis Cezaron kaj mi edziniĝis. Ni estis tre feliĉaj. Cezaro ofte ripetadis ke fine li trovis tion, kion li vane serĉis dum longaj jaroj: knabinon bonan, belan, lojalan kaj laboreman. — La sorto rekompencas la paciencon — li diradis.

Mi ne filozofadis, mi ne komentis mian feliĉon. Mi ja estis tiel enamiĝinta! Tiel mi sopiris al la edzo, kiam li forestis — kaj li ofte forestadis, li estis aviadisto, li flugis al Parizo, Romo, Londono, eĉ Novjorko. Mi sĉipovis diveni liajn dezirojn. Atendante lian revenon mi kuiris ruĝan barĉon, aŭ mi aĉetis biletojn por fama filmo. Ĉiam montriĝis, ke dum la tuta flugo li revis ĝuste pri tio, kion mi preparis: pri la ruĝa barĉo, aŭ pri la kinejo. Li ja povis telefoni el la flughaveno, por sciigi al mi siajn dezirojn, sed li neniam tion faris. Li estis tiel delikata... La telefono silentis kaj mi ĉiam divenis.

Iun sabaton, atendante la revenon de Cezaro mi ordigis nian loĝejon. Entuziasme mi purigis, lavis, frotis, brosis, poluris, ĝis fine ĉio brilis. Mi eksidis por ripozi kaj tiam mi ekaŭdis la konatan jam al mi, softan ĝemon. Mia hedero! Kion ĝi volas?

— Ho, pardonon, kara planteto, mi forgesis, ke unu el viaj rampiloj pendas tiel malalte super la pordo!

Mi liberigis la kompatindan rampilon kaj mi eksentis, ke mi devas tuj kuri al alia pordo, al tiu enira. Mi malfermis ĝin kaj mi vidis Cezaron.

— Mi revenis pli frue kaj mi scivolis, ĉu vi divenos tion!

— Vi interparolas kun mi tute kiel mia hedero! Eble vi estas parencoj?

— Eble! Vidu, mi havas verdajn okulojn.

— Jes! Kaj viaj brakoj kaj kruroj estas tiel longaj, veraj rampiloj!

Ni ridis longe duope, poste vespere ankoraŭ ni ŝercis triope kun mia simpatia najbarino el la supera etaĝo. Lastatempe ŝi amikiĝis kun mi. Komence mi estis malfidema. Eble ŝi volas delogi mian belan edzon. Sed baldaŭ mi ĉesis ŝin suspekti. Ŝi estis tre deca, ĉiam ŝi kondutis modeste.

Mia feliĉo finiĝis tute subite. Sur mia maldekstra vango aperis neatendite malgranda, verda makulo. Ĝi kreskis ĉiutage. Mia edzo tre nervoziĝis.

— Vi pentris ion! li kriis.

— Ne, mi nenion pentris, eĉ mi ne havas hejme verdan farbon.

— Do, kiamaniere vi akiris tiel aĉan makulon? Forlavu ĝin!

— Ve, ĝi ne estas forlavebla. Mi jam provis.

— Vi terure malbeliĝis — konstatis mia edzo. Li rememoris, ke li havas ion urĝan por fari ekster la domo kaj li foriris. Mi vizitis kuraciston. Li esploris mian vizaĝon, starigis al mi multajn demandojn. Fine li diris:

— Mi havas por vi neniun kuracilon. Vi devas forĵeti la hederon el via loĝejo. Vi havas specife senteman organismon. La hedero estas la kaŭzo de via malsano. Estas kelkaj specoj de hederoj. La vian mi opinias escepte malica. Ne ĉagrenu, via makulo malaperos dum kelkaj semajnoj.

Mi revenis hejmen. Mi demetis mian amatan planton de la vandoj. Surprizita, ĝi timis tiel forte, ke ĝi eĉ ne ĝemis. Mi starigis la terpoton sur la fenestrobreto en la koridoro, mi enbatis kelkajn najletojn en la muron, super la ŝtuparo. Mi helpis al la hedero instaliĝi en la nova loko. Daŭre terurigita, ĝi scipovis tamen peti:

— Akvon!

Mi iris al mia loĝejo kaj revenis post momento kun kruĉo da akvo. Senbezone. Mia hedero, videble tre feliĉa, jam migris al la supera etaĝo, en la brakojn de mia najbarino. Mi estis tre kontenta. Mia edzo male, post la reveno hejmen fariĝis furioza. Li, tiel milda!

— Vi estas kruela, sen koro! Hodiaŭ vi forĵetis la planton, morgaŭ vi forĵetos min! La makulo sur via vango estas la signo de via malbona karaktero. Vi kaŝis ĝin sufiĉe longe. Mi ne plu estos kun vi. Adiaŭ!

Li iris rekte... al mia najbarino. Mi ne povis kompreni, kial trafis min tia malfeliĉo. Mi ploris. Ĉiutage mi atendis la revenon de mia edzo kaj la malaperon de la klorofila stampo. Miaj esperoj realiĝis nur duone. Post du semajnoj mi rimarkis, ke la verda makuleto paliĝis iom kaj malgrandiĝis, post unu monato ĝi malaperis. Denove mi estis bela. Mi ĉesis plori, eĉ mi akceptis bukedon da floroj de unu el miaj oficejaj kolegoj.

Mia eksedzo kaj mia najbarino uzas ĉiam lifton, por ne renkonti min en la ŝtuparo. Hieraŭ tamen mi preskaŭ kunpuŝiĝis kun ŝi, en la foira placo. Ŝi ŝajnigis ne vidi min, kvazaŭ tiel okupita per aĉetoj. Mi tamen vidis ŝin bone. Estis tagmezo, brilis la suno. Mi rimarkis ŝian novan robon, ŝian novan ŝminkon kaj... jes — etan, verdan punkton sur ŝia maldekstra vango.

panoramo

Knabino el Kazár — foto de Péter Korniss

Danco — foto de János Eifert



La Hungarlanda *socia asekuro*, direktata de la Landa Sindikata Konsilio (SZOT), konatigis sian budĝeton por 1977. La tuta sumo atingas la 58 miliardojn da forintoj, kies du trionoj estos elspezataj kiel pensioj, apogoj kaj diversaj kompensoj. Preskaŭ 20 procentoj de la loĝantaro estas emeritoj, ja la aĝolimo, kiu rajtigas je pensio, estas el inter la plej malaltaj en Eŭropo. Kromsalajron ricevas ĉiuj gepatroj, kiuj havas pli ol unu infanon; tio bezonas 8 miliardojn. La sumo de rekompencoj *pro malsano* atingos la 7 miliardojn. *Patrinoj* — kun infanoj malpli ol 3 jaraj — rajtas provizore forlasi laborejon, kaj ricevas kvazaŭ salajron — nur por varti hejme siajn infanojn. Antaŭ kaj post la nasko la patrinoj ricevas krompagon. Laŭ la nova sanitara leĝo, jam ĉiu hungara civitano — senkonsidere la aĝon, profesion, aŭ situon — senpage ricevas ĉiuspecan kuracistan kaj hospitalan prizorgadon kaj medikamentojn. Sekve, la ĝisnuna socia asekuro iĝis tute ŝtata tasko, do okaze de malsano, labor-malkapablo kaj maljuniĝo la ŝtato nem zorgas pri ĉiuj civitanoj, subtenas krome patrinojn kaj infanojn.

★

Japanaj ksilografaĵoj estis elmontritaj en la Artindustria Muzeo en Budapest, kies ekspozicion aranĝis la Instituto por Kulturaj Rilatoj kaj Japana Fonduso. En Tokio la libroeldonejo *Kobunsa* aperigis i.a. jam kvarfoje la hungaran romanon „Niki" de hungara verkisto Tibor *Déry*, la duan eldonon de albumo kun reproduktaĵoj de la plej belaj pentraĵoj el la hungara Muzeo. de Belartoj. Okaze de la centjara jubileo pri *Ady*, Kobunsa eldonos volumon kun elektitaj poemoj de la granda poeto.

★

Pri hungara arto ĉirkaŭ la jarcent-turno, estis ekspozicio en Parizo (*Petit Palais*). La Instituto por Kulturaj Rilatoj — en kadro de la franca—hungara kultura kontrakto — daŭrigas prezenti al la franca publiko la hungarajn belartojn. Pli ol 500 artaĵoj, — ankaŭ teksaĵoj, mebloj, tradiciaj vestaĵoj kaj afiŝoj — prezentis la stilon de tiu epoko. Estis eksponitaj pentraĵoj de *Csontváry, Csók, Czóbel, Egry, Ferenczy, Gulácsy, Iványi-Grünwald*. Du ĉambregojn de Petit Palais plenigis diversaj folkloraj artaĵoj, inter ili ĉambro kun la famaj multkoloraj brodaĵoj el la regiono *matyó* (pr. matjo) el vilaĝo *Mezőkövesd*.

★

Ankaŭ en Parizo, la Muzeo de Dekoraj Artoj prezentis la unuan apartan ekspozicion de *Moholy-Nagy*. La grandiozan kolektaĵon aranĝis la Arta kaj Kultura Centro *G. Pompidou* kaj la Centro de Industriaj Kreaĵoj; ĝi konsistas el 200 verkoj de László *Moholy-Nagy* (1895—1946): pentraĵoj, desegnoj, grafikaĵoj, afiŝoj, skulptaĵoj, fotoj. Lia gravega agado en la tipografio, filmo, teatro, kaj industria formo-kreado, same lia art-pedagogia laboro estis vaste demonstritaj, precipe el verkaro kreita ĉe *Bauhaus*, en Berlino kaj Ĉikago kaj el tiamaj *„avangardismaj"* revuoj. La ĉefa organizanto, *Chantal Béret* deklaris, ke multaj rigardis tiun genian artiston kosmopolito pro lia multflanka aktiveco; tamen li mem manifestis antaŭ sia morto: „Mi ne nur naskiĝis hungaro, sed ankaŭ tia mi mortos!"

★

Hungaraj kulturaj semajnoj okazis en francaj urboj *Le Havre* kaj *Reims*. La urbestro de Le Havre akceptis solene la gastojn kaj artistojn el Hungario, kaj montris al ili, ke sur la invitiloj staris presite: „Lo-

panoramo

ĝantoj de nia urbo, venu por ekkoni la vivon de la hungara popolo, kiu vivas en la koro de Eŭropo!" Kelkaj frazoj estu ĉi tie citataj el la gazetoj; *Paris—Normandie:* „La hungaran realon multflanka kultura prezentado spegulis... La hungara Ŝtata Koncertorkestro sonis majeste bela... kaj la publiko, kaj la kritikistoj estas ravitaj pro la alta nivelo de la koncerto." *Le Havre Presse: „Kodály, Liszt* kaj *Bartók;* de la tri grandaj hungaroj ni aŭskultis sub dirigentado de *Ferencsik."* *Le Havre Libre:* „La Ensemblo-Kolinda, la Ciganidaj orkesto kaj danchoro, la *Camerata Hungarica* ludis kun profundaj sentoj, muzika talento kaj abunda artismo." Oni raportis ankaŭ pri filmoj, ekspozicioj kaj folklora arto.

Reims atendis la Krisnaskajn tagojn: super la stratoj pendis iluminitaj festonoj kun surskriboj: Bonajn festojn! — En la sepcent-jara S. Jakobo-preĝejo sonis la malnova orgeno, — verkojn de *Liszt* kaj *Bach* ludis la hungara G. *Lehotka.* Mur-afiŝoj invitis eĉ en la preĝejoj al prelego: „Ŝtato kaj eklezio en Hungario". En halo de la Kultur-palaco „A. *Malraux*" pendis fotoj pri filmreĝisoro *Jancsó* kaj aktorino *Törőcsik;* ilia filmo *„Elektra"* akiris grandan sukceson, same la Orkestro *Sebő,* la Ciganida Ensemblo, kaj aparte la ekspozicioj pri Bartók, pri hungaraj filmoj kaj libroj. Oni tumultis en la mil-sidloka teatro, en ekspozicioj pri folkloro, pentraĵoj kaj grafikaĵoj.

La multaj francoj, kiujn plezurigis en la Petit Palais la hungara secesio-arto, en Le Havre kaj Reims la muziko de Bartók, pere de filmoj konatiĝis kun la hungara vivo, — certe ofte memoros pri la nacio apud la Danubo, pri ties pacema etoso.

★

En urbo *Gödöllő* (proksime al Budapest) ankoraŭ diligente laboras la 93-jara J. *Remsey,* konata pentristo. Li nun ekspoziciis bildojn, kiujn li pentris en Parizo kaj aliloke en Francio. La publiko amase vizitas la vere sukcesintan pentraĵo-kolekton.

★

En Transilvanio (en Rumanio) juna hungara ĵurnalisto, Péter *Cseke* vekis sensacion per analizaj studoj pri la genro de gazet-raportaĵoj. Akirinte en la universitato de *Kolozsvár (Cluj)* diplomon pri hungaraj lingvo kaj literaturo, la talenta viro ricevis la duan diplomon en ĵurnalisma altlernejo. El lia disertacio pri gazetraportaĵoj longan parton aperigis la revuo *„Korunk"* (nia epoko) en Kolozsvár. Jam aperis lia aparta volumo en Bukareŝto: „De okcident-akvo ĝis orient-akvo". Laste Cseke verkis komune kun B. *Marosi* volumon de raportaĵoj, kun titolo: „Homvizaĝoj".

★

Sude de Hungario en Jugoslavio troviĝas la aŭtonoma regiono Vojevodio kun grandnombra hungara loĝantaro. Ili havas florantan hungarlingvan literaturon, gravajn gazetojn kaj revuojn. En la ĉefurbo *Újvidék* (Novi Sad) funkcias hungara eldonejo *Fórum,* kies nova ĉefdirektoro iĝis Imre *Bálint.* Li estas membro de prezidio de CK de Unio de Jugoslaviaj Komunistoj, vicprezidanto de Vojevodio, kaj jam de jaroj gvidanto de gazeteldonejo *Hét Nap* (Sep tagoj). La ĵurnalo *Magyar Szó* (Hungara Voĉo) havas novan ĉefredaktoron, Károly *Erdélyi,* kiu jam de 15 jaroj laboras ĉe tiu ĵurnalo en Újvidék.

Komp. Szilárd *Bálint*



Jenő Remsey, pentristo

Funebrantaj virinoj — **foto de** *Péter Korniss*

Mária Rózsa Szabó

REVUO DE REVUOJ

Malmultaj periodaĵoj estas en Esperantio, kiuj havas eblecon festi sian veran jubileon. Estas tutmonde konataj el Japanio: *La Movado,* fondita en 1951, *Oomoto,* en 1925, bravaj heroldoj el la fora oriento. HV salutas ilin!

Pluraj omaĝas al Kálmán *Kalocsay,* i. a. Marjorie *Boulton* kaj Tiberiu *Morariu,* en kolumnoj de La Brita Esperantisto 1976 (marto-aprilo); La Espero (sveda, 1976/4; fondita en 1913!) Franca Esperantisto same 1976 (marto-aprilo; fondita en 1908!)

Pri Kalocsay, nia plej modela stilisto skribas M. *Boulton:* „... Li mortis nur kiam li estis vere aĝa, plenumis grandan artan destinon, kaj postlasis senmortan trezoron senkomparan, revolucion pri la artaj kriterioj de Esperanto, ĝojon eĉ por homoj ankaraŭ ne naskitaj... Kalocsay faris tion, kion nur kelkaj geniuloj en iu epoko faras: li modifis tutan kulturon, maturigis lingvon, postlasis multkapelan, muzikoplenan, vitralojuvelitan katedralon de arto."

Kvazaŭ daŭrigante filologiajn kontempladojn pri E, multaj eseoj okupiĝas pri la *Lingvo kaj ideologio* de Michel *Duc-Goninaz* en Heroldo de Esperanto — Scienca Suplemento. Pri „Problemo de etnaj kaj naciaj lingvoj skribis en Oomoto realisme V. *Sadler.* W. *Auld* prelegis dum ISU en Ateno pri „Lingvo kaj kulturo", kiun nun publikis la Budepeŝta Informilo. Granda studo resumas la fundamentajn principojn en la lingva teorio de Zamenhof: „Genia lingvisto venkita de etburĝeco" en L'Omnibuso, kies aŭtoro estas grava, sed iom forgesita soveta esperantologo, E. F. *Spiridoviĉ* (1891—?). Ĝi aperis en 1931 ruslingve en la teoria revuo de SEU, (unio de sovetaj e-istoj), kaj poste en E sur paĝoj de La Nova Etapo (organo de revoluciaj E-verkistoj). Menciinde estas, ke L'Omnibuso — aperanta en Kioto — estas la tria grava E-revuo japana!

Esperanta Finnlando okupiĝas pri ŝajne teoria temo: *Esperanto — ĉu artefarita aŭ natura?* La aŭtoro, Jouko Lindstedt opinias — ni same — ke... „la lingvo estas socia institucio; tial oni rajtas plani ĝin. E estas planita lingvo. Lingvoplanado povas esti aŭ rekta planado, aŭ rekomenda flegado. Kiel la kulturitajn naciajn lingvojn, E-on koncernas ĉefe la unua el tiuj; ĝi siatempe naskiĝis per rekta planado, sed tiel naskiĝis kaj ankaŭ nuntempe naskiĝas la junaj literaturaj lingvoj de novaj nacioj... Finfine, la evoluo de E-o estas nuntempe simila al tiu de la naciaj lingvoj en sia matureco."

Literatura Foiro aranĝis en *Iisalmi,* Finnlando, seminarion pri problemoj de la internacia presio. Estas demando, ĉu revuo kapablas esti vere internacia? Laŭ ni tio dependas ĉefe de karaktero de la koncerna revuo, de ties temaro kaj spirito — la internacia lingvo certe apogas tian tendencon, sed per si mem ankoraŭ ne certigas ĝin.

Bulgara Esperantisto publikis la rezolucion de la 39-a Kongreso de BEA, kiu decidis i. a.: „... fari pli insistajn provojn pri E-lingva eldono de verkoj de nia artliteraturo, libroj kaj broŝuroj pri niaj historio, naturaj, kulturaj kaj turismaj vidindaĵoj. Oni aperigu en bulgara lingvo broŝurojn pri la problemoj de la Internacia Lingvo." Kun granda intereso ni atendas la bulgarajn eldonaĵojn — rezultojn de la ĉiam konscia agado de BEA.

„Ĉe komenco de nova, rapida prospero" titolas *Der Esperantist* la interparolon de A. *Sugár* kun Mahomed *Isajev,* prezidanto de Soveta E-Komisiono en Moskvo. La gravan intervjuon publikis unue HV 1975/4, ni instigas ĉi-okaze tiujn, kiuj ankoraŭ ne faris: legu ĝin.

EĤO (jam 48-jara revuo de Dana E-Asocio) aprecas la meritojn de la hungardevena *Andreo Cseh,* honora membro de UEA, instruisto de dekmiloj da verdstelanoj diverslandaj — okaze de lia 81-a naskiĝtago. Adreso por bondeziroj: Pensiulejo Scholten, *Grothert Laan* 162, NL—2012, *Den Haag* — kie li vivas inter ne tro bonaj cirkonstancoj. Ni varmege bondeziras!... kaj estas certaj, ke la esperantistaro tutmonde rememoros la elstaran majstron!

Instruisto serĉata — skribis PILOPRESS: oni serĉas instruiston aŭ alian interesemulon kun akademia finstudo pri matematiko aŭ psikologio aŭ elektrotekniko aŭ lingvistiko (el Ŝtato de la Eŭropa Komunumo) por la Instituto pri Cibernetika Pedagogiko, *Paderborn.* Ĉi tie duontagon okupos E-instruado kun scienca esplora kunlaboro, duontagon liberaj studoj (ekzemple por doktoriĝo). Sekvinda intenco! Cetere Paderborn estas movada fenomeno. La interlingvistika konferenco en novembro 1976 altiris tien plurdekojn da scienculoj kaj pedagogoj el 14 landoj — mencias la revuo ESPERANTO. Dum la kvintagaj diskutoj oni akceptis ok rezoluciojn por altiri atenton de diversaj ekstermovadaj kaj movadaj institucioj kaj instancoj.

La probleemo de IL estas *„ne ĉefa, sed grava"* — opinis la 7a Konfereneco de Unuiĝo de Laboristoj en Konstru- kaj Ligno-industrioj, okazinta en Prago. Petro *Levi* en Sennaciulo detale raportas pri tio, emfaze ankaŭ pri Sándor *Gáspár,* ĝen. sekretario de la Hungara Sindikataro. Ege gravas tiu lia deklaro — skribis la kronikisto de SAT — ke la hungaraj sindikatoj esprimos siatempe al la Mondligo de Sindikatoj, ke Esperanto estas utila rimedo en la reciproka proksimiĝo kaj disvolvo de interrilatoj por la laboruloj.

La Brita Esperantisto publikis interesan artikolon: „Nova lingvo, ĉu?" *Valentino,* la aŭtoro kvazaŭ trovis novan lingvon — dum la Brita E-Kongreso! Eble pli facilan ol E? La apero de „Esperangla" devenas el la prononcmaniero de angloj, el kiuj — laŭ Valentino — multaj uzas ĝin. Jen detalo el tiu dialekto: *„Mi volas rilati al vi miajn idejojn pri la Sesdejka brita E-Kongrejso, kiu ĝustej okazis en Chester. Jej la firsta vespejro mi arivis ĝustej post la sesa, kaj mi iris al la kongresejo por ĉeki pri la tuta programo. Mi tutej nej ekspertis trovi tiom da gejamikoj dum la firsta vespejro, kaj mi nej notis kiel rapidej pasis la tempo... Ni ardemuloj kiuj nej partoprejnis la ekskursojn kafdrinkis triopej kaj kvaropej kaj uzadis la lingvon jej nivejlo kiel eblej plej alta... La ĉejfa prejlejgo dej la kongrejso okazis posttagmejzej jej lundo..."* Kaj tiel plu... dume mi rememoras pedagogo-renkonton en urbo *Szeged.* Ni ripozis dum ege varma somertago ĉeborde de rivero *Tisza,* kiam subite ekkriis germana junulino: Ho, mi rapidegas en la *panejon.* Ĉiuj ridegis laŭte, tamen ŝi nek sentis, nek komprenis la diferencon inter la fonemoj p kaj b. Sekve ŝi kaptis fiŝojn anstataŭ pano. Simile eraras multaj japanoj kiam ili devas distingi inter la sonoj b kaj v, aŭ l kaj r. Kaj la hungaroj, ĉu?



Akvonodo ĉe Kisköre

Medioprotektado en Hungario

Kien direktiĝas la akvomastrumado en Hungario?

Verkis: D-ro Ferenc László

Ĝenerale estas konate, ke la akvo esence influas la socian-ekonomian evoluon en ĉiu lando de nia Tero. En nia epoko preskaŭ ĉiu rilato inter la socia-ekonomia vivo kaj la natura medio estas kunligita kun la akvocirkonstancoj. Pro la altiĝo de la teknika, ekonomia kaj kultura niveloj kreskas la kvantaj kaj kvalitaj pretendoj por la akvo, kaj pliiĝas ŝirmaj postulaĵoj kontraŭ nocaj efikoj de la akvoj. Kune kun la dinamike kreskantaj akvobezonoj de la modernaj produktado kaj vivcirkonstancoj unu el la fundamentaj kondiĉoj de la ekonomia prospero estas la akvo, kiu samtempe povas esti ties malhelpo sur tiaj terenoj, kie ĝi mankas, aŭ troviĝas nur en ne konforma kvalito, aŭ en malutile superflua kvanto.

En Hungario estas imperativa necesaĵo la lukto *por* kaj *kontraŭ* la akvo, kio estas klarigebla per la geografiaj kaj hidrologiaj dispozicioj de la lando. Nome ĉi tie renkontiĝas diversaj klimataj, orografiaj, agrologiaj* zonoj, kiuj kreas specialajn temperaturajn kaj precipitaĵajn cirkonstancojn. Jara meznobro de la precipitaĵo estas 620 mm, ĝiaj ekstremaj kvantoj alternas inter 300 kaj 120 mm. Jara meznombro de la vaporiĝo estas 500—600 mm. Proksimume 10% de la precipitaĵoj nutras per de-

**agrologio:* grund-esplorado, prospektorado.

Akvorezervujo kostruata ĉe Pálka

fluado la surteran akvoprovizon kaj rezervigas en la grundo, dume 90% vaporigas.

Nia lando situas en la centro de la Karpatbaseno, granda parto de ĝia akvokolekta teritorio estas ekster la limoj de la lando, tial 96—99% de la tersupraĵa akvokvanto alvenas el la najbarlandoj.

La teritoria distribuado de akvoprovizo estas malfavora. La tri grandaj riveroj de la akvosistemo estas: *Danubo,* trafluanta la landon en longeco 417 km-a, *Tiso* (malnova nomo: Tibisko), fluanta 600 km-jn tra *Nagy-Alföld* (landmeza Granda Ebenaĵo) kaj *Dravo,* kiu formas 140 km-an limon inter Hungario kaj Jugoslavio. 90% de la tersupraĵa akvoprovizo kunigas en iu el la fluejoj de ĉi tiuj grandaj riveroj (pli granda parto en Danubo kaj Dravo, kaj nur dekono en la akvoreto de Tiso).

La akvovanto de la fluejoj estas ekstrema kaj loke kaj tempe. La proporcio de la minimuma kaj maksimuma akvokvantoj estas ĉe Danubo 1:15, ĉe Tiso 1:80. En la plej malgrandaj akvofluoj tio povas esti plur-milobla.

Kvarono de la surfaco de la lando estas ebenaĵo kuŝanta pli malalte ol la inundo-nivelo, tial tiu teritorio estas minacata de la inundo far la superakvoj de montaj riveroj kaj de precipitaĵoj sur sendefluejaj terenoj.

La akvogeologiaj cirkonstancoj tamen estas favoraj kaj tial la lando posedas grandan subteran akvoprovizon.

La akvobezonoj de la socio forte influas la evoluon de produktantaj faktoroj. La multan akvon bezonantaj popolekonomiaj brancoj (agrokulturo, energio-, kemio-, nutraĵo- ktp. industrioj) pro la rapida prospero en la ekonomio, kaj la kulturaj kaj specialaj pretendoj, krome la moderna urbevoluigo —estas la unuavice menciendaj faktoroj.

La plej granda akvokonsumanto estas la industrio kiel sekvo de la ŝanĝo okazinta en la strukturo de la popolekonomio. Pro la industriiĝo kaj urbanizado, pro kemiizado de la agrokulturo, kreskanta kvanto da polucio misas kaj nocas la utiligeblon de la akvoprovizo. Estas grandmezura la akvopolucio devenanta el translimaj teritorioj. La plinbonigo de kvalito kaj malhelpo de malpuriĝo de niaj vivaj akvoj iĝis socia tasko de ekzistenca graveco kaj tial oni devas apliki modernajn, efikajn teknikajn rimedojn.

La akvo jam ne estas rigardebla libere uzata natura trezoro. Sekve de la kreskanta akvouzado kaj akvopolucio, elĉerpiĝas la pli facile utiligeblaj provizoj, daŭre iĝas malfacila la akiro de akvo. Por transponti la spacajn kaj tempajn grandajn diferencojn, sperteblajn en la akvoprovizoj kaj akvopretendoj, estas necesaj kompleksaj hidrologiaj aktivadoj, ampleksantaj pli grandajn terenojn kaj tuŝantaj interesojn de pluraj branĉoj. Tiaj estas: reguligo de la naturaj akvofluoj, rezervado kaj sistema distribuo de provizoj, la kondukado de akvoj el terenoj de abundaj akvoj sur lokojn malriĉajn je akvo, la neceso malkaŝi provizakvojn en terprofundoj, uzo de produktado-teknologioj ŝparantaj akvon, ktp.

Sur teritorioj minacataj de inundoj kaj akvoj, sur terenoj sen defluejo, necesiĝas konstruado de granddimensiaj kaj grandefikaj ŝirmodigoj.

Produktado de akvoj en necesa kvanto kaj kvalito, forigo de akvonociĝoj postulas grandajn sociajn elspezojn. La akvomastrumado kunligiĝas sur vasta teritorio kun diversaj branĉoj de popolekonomio, ĝia efiko etendiĝas sur vastajn terenojn kaj por longa tempo. La laŭplana, proporcia evoluigo, la akvomastrumado kaj koneksaj ekonomiaj branĉoj bezonas akordigon, ĉar tiuj estas gravaj faktoroj de ĝenerala evoluo de popolekonomio.

Pluraj akvomastrumadaj laborbranĉoj, kaj interne de tiuj vertikala kaj horizontala labordividoj formiĝis kaj estas formiĝantaj, specialiĝantaj, kiel sekvo de la teknika evoluo kaj de kresko de la sociaj postulaĵoj rilate la akvojn.

La pretendojn, kiel konsekvencojn de la socia-ekonomia evoluo, la kompetentaj registaraj organoj konsekvence plenumas laŭ perspektivaj, mezetapaj kaj jaraj planoj de akvomastrumado.

Unue ni trarigardu, kiel realiĝis la celoj de akvomastrumado de la IV-a kvinjarplano finiĝanta en 1975. Poste ni konatiĝu kun la antaŭviditaj evoluigaj konsideroj sur tereno de akvomastrumado en la V-a kvinjarplano, kies unuan jaron ni ĵus trapasis.

Realiĝo de la celoj de akvomastrumado, projektitaj en la IV-a kvinjarplano

En la periodo de la IV. kvinjarplano akceliĝis la evoluigo de akvomastrumado kompare kun la antaŭaj periodoj. En la fronton estis metita la evoluigo de *akvoprizorgado kaj la forkondukado* de poluakvoj, parte pro la *urĝigaj sociaj pretendoj,* parte pro *efiko* de komunumaj instalaĵoj koneksaj kun la ŝtata logejkonstrua programo. La celoj ĝenerale plenumiĝis — escepte la poluakvo-purigadon.

Ni resumu la efektiviĝon de la ĉefaj celoj.

Altigo de la Balatona bordo

Konforme al la planoj efektiviĝis la akvoprizorgado de loĝantoj kaj loĝkolonioj. *Ĝis jarfino 1975 estis prizorgita per komunuma akvoservo 65—66% de la loĝantaro.*

La evoluigo de la kanalizado iom postrestis de la planita. La malproporcion inter akvoprizorgado kaj kanalizado ne sukcesis malgrandigi dum la planperiodo.

Kompreneble signifas problemon, ke la *planitaj plenumoj nur parte realiĝis en la poluakvo-purigado.* Ties kaŭzoj estas unuflanke *intuiciaj miskomprenoj,* aliflanke la *discentralizeco de la financaj fortoj.*

La planita evoluigo de la agrokultura akvoprovizado grandparte efektiviĝis en la planperiodo.

Por preventi la damaĝojn kaŭzatajn de la akvo estis dediĉitaj kvin miliardoj* da forintoj: por instalaĵoj kontraŭ inundoj, por reguligo de riveroj, lagoj, ktp.

La efikeco de tiuj laboroj montriĝis *okaze de la inundoj en 1974 kaj 1975.*

La konstruado de rezervujoj grandigis la utiligeblajn akvoprovizojn. Grava okazajo estis en la planperiodo la ekfunkciigo de la unua akvonodo ĉe *Kisköre.* Ĝi estis unu el la plej gravaj ĉeneroj de la akvolivera sistemo en valo de Tiso.

Por ĉesigi la akvomankojn en iuj terenoj de Transdanubio pretiĝis la rezervujoj ĉe *Fehérvárcsurgó, Zámoly* kaj *Pátka,* por certigi la akvoprizorgadon de la industria regiono en departemento *Borsod* konstruiĝis la rezervujo ĉe *Lázbérc.* La akvouzon de *lago Balatono servos* la kluzo ĉe elfluejo de kanalo *Sió,* tra ĝi elfluas la lagakvo al Danubo.

Por evoluigo de la akvomastrumado en la IV-a kvinjarplano estis uzita 32,8 miliardoj da forintoj, t. e. 5,7% de la investada spezo de la popolekonomio.

Plenumo de la akvomastrumada kvara kvinjarplano donas konforman transiron al la fundamentado de evoluigaj celoj de la V-a kvinjarplano. Tio kontentigos sur konstante altiĝanta nivelo la socian-ekonomian pretendon rilate la akvomastrumadon.

Ĉefaj celoj de akvomastrumado en la V-a kvinjarplano

La IV-a leĝo 1975 pri la kvina kvinjarplano de la popolekonomio preskribas por la evoluigo de la akvomastrumado la sekvajn:

Por efika utiligo de la akvoprovizoj estas *daŭrigenda evoluigo de la sistemoj servantaj la akvomastrumadon* harmoniigitan sur vastaj teritorioj. En valo de Tiso oni devas *fini la duan etapon de la akvonodo ĉe Kisköre,* kaj *prepari* la *konstruadon de la akvonodo en Csongrád.*

Por plua utiligo de la akvomastrumada, energioproduktada kaj navigacia eblecoj sur Danubo estu preparata kune *kun la Ĉeĥoslovaka Socialisma Respubliko la Danuba akvoenergio-centralo kaj akvonodo-sistemo.*

Evoluigenda estas la *komunuma akvoprovizada servo en la ĉefurbo, en iom grandaj industriaj centroj* kaj en tiuj malgrandaj loĝkolonioj, kies akvoprovizado estas la plej malbona. *Je la fino de la planperiodo 72—73% de loĝantaro estu provizita per akvodukta akvo.* La *kanalizadon* oni devas tiel evoluigi, ke *ĝis 1980 havu kanalizadon 35—37% de la loĝejoj.*

Por malhelpi la pluan polucion de la akvoprovizoj, resp. por malpliigi la jam estantan polucion en iuj teritorioj, estas kreskigenda la kapacito de poluakvopurigado de la *loĝteritorioj per taga povumo po 650—700 mil m³.*

Per fortigo de la ŝirmadaj establaĵoj kaj de ŝirmada organizaĵo oni devas *plu grandigi la sekurecon de la nacia trezoro, minacata pro inundoj kaj akvoj de sendefluejaj terenoj.*

La planleĝo pritraktas ankoraŭ en pluraj lokoj senpere la akvomastrumadajn taskojn, inter kiuj speciale grave estas, ke la evoluigon de *poluakvopuriga kapacito* oni devas koncentri al la ĉefurbo, al la industriaj fokusoj de la *akvokolektaj teritorioj de Tiso* kaj al grandaj urboj ne havantaj vivajn akvojn. Distingite estas aranĝenda la *ŝirmado de akvokvalito de lagoj Balatono kaj Velencei-tó.*

En harmonio kun la instrukcioj de la leĝo, inter la akvomastrumadaj celoj la plej gravaj estas la la sekvaj:

— *certigendaj estas la akvobezonoj de loĝteritorioj kaj produktaj industribranĉoj,* inter tiuj — pro la rapida loĝejkonstruado kaj la sociaj pretendoj por levi nivelon de la komunumaj servoj de ekzistantaj loĝejoj — evoluigo de akvoprizorgado kaj poluakvo-kanalizado. La nombro de komunuman servon bezonanta loĝantaro kreskos per pr. unu miliono kaj atingas 72—73%-jn de la landa loĝantaro. 56% de la tutlandaj loĝejoj estos provizitaj per komunuma akvoservo.

La *evoluigo de kanalizado* estas iom pli malrapida; pr. 43% de la loĝata teritorio kaj *35—37% de la loĝejoj havos kanalizadon.*

Pro la limigitaj energio- kaj materialo-ebloj la *poluakvo-purigaj kapacitoj estas evoluigeblaj en la plej necesaj lokoj laŭ severa vicordo,* unuavice en la ĉefurbo, en iom grandaj industriaj centroj kaj sur plej grandtrafikaj sumerumejoj. Pro la pli malgranda evoluo de la poluakvo-purigado ĉe fino de la planperiodo *ĉiutage po 300 mil m³ da nepurigita poluakvo fluas en la kanalojn kaj en surterajn akvofluejojn, malbonigantaj per tio la kvaliton de akvoprovizoj. Reekvilibrigo estas atendebla nur dum la VI-a kaj VII-a kvinjarplanoj* — kalkulante laŭ la nunaj energioeblecoj;

— *por ŝirmi la nacian trezoron da pr. 350—400 miliardoj* ft sur teritorioj danĝerigitaj de inundoj, por sekurigo de la agrokultura produktado, estas evoluigenda la akvoaranĝado pli efike, koncentrite sur pli grandajn terenojn per fortigo de defendaj organizaĵoj kaj de kontraŭ-inundaj digoj;

**miliardo:* mil milionoj = 10^9

— en la evoluigo de la *irigacio* ĉefa tasko estas *la ekonomia ekspluatado de la ekzistantaj irigaciaj instalaĵoj* kaj tial estas rapidigenda la finkonstruado de la jam konstruataj irigaciaj establaĵoj. *Konstruotaj estas unuavice novaj irigaciilaroj sur tiuj terenoj, kie jam estas disponeblaj la akvoprovizoj,* al kiuj estas ligitaj konkretaj irigaciaj bezonoj kaj *kie plej rapide estas ebleco efike utiligi la ŝtatan financan helpon* (ekz. en tereno de *Kisköre);*

— *la kreskantajn akvobezonojn ni kontentigu per pli efika ekspluato de niaj akvoprovizoj.* Tiucele ni devas *evoluigi* parte *la funkciantajn sistemojn de la valo de Tiso, kiuj ebligas la akvomastrumadon,* — aliparte oni devas konstrui la fundamentajn establajojn de la kunakordigataj akvomastrumadoj sur tiuj akvokolektaj terenoj de la lando, kie plej granda estas la neceso por tio. Por ties intereso okazas preparoj de la akvonodo ĉe Ĉsongrád;

— en la planetapo estas projektita la *preparo de Akvonodaro Gabcikovo-Nagymaros,* kiu servos energi-ekonomiadan, navigacian kaj akvomastrumadajn utiligojn sur la komuna hungara-ĉeĥoslovaka limo sur Danubo.

La rezultoj realiĝantaj per tiuj investadoj estas resumeblaj laŭ investadaj celoj, resp agadsferoj jene:

Akvoprodukto, poluakvo-duktado kaj purigado, banejprovizado kaj utiligo de termo-akvoj.

Investada kadro antaŭvidita por tiu celo estas 30 miliardoj da forintoj. Fundamente evoluos la plej pretendema formo de la provizado, tiu de komunuma provizado ene de la loĝejoj. Tiuj investadoj subtenas unuavice la loĝejkonstruan programon. Fine de la planperiodo 50% de la loĝantaro havos akvoservon el kranoj interne de la loĝejo, pr. 10% el kranoj sur koridoro aŭ kortoj kaj ĉk. 13% el strataj kranoj.

La komunumservaj akvoinstalajoj kreskigos la akvoproduktan tagan kapaciton de po 2,9 milionoj m^3 je 3,8 milionoj m^3, kio ebligas plibonigon de la kvalito de provizado, kaj ankaŭ evoluigon de akvouzado.

Dum la planperiodo ne estas malgrandigebla la proporcio elformiĝinta inter akvoprovizado kaj kanalizo, kaj iom pli modeste estas evoluigeblaj la poluakvo-purigaj kapacitoj.

Interne de tiuj eblas realigi pli akcentite la solvon de plej gravaj problemoj en la akvokvalitato-ŝirmado, resp. medioprotektado (koncentritaj, grandvolumenaj poluakvoj), — tiuj estas problemoj ankaŭ de la ĉefurbo kaj grandaj provincaj urboj *(Debrecen, Győr, Miskolc, Pécs, Szeged),* krome la urbo *Szolnok,* poluanta la riveron Tiso, — kaj la pleje vizitataj ripozejoj, — ĉiuj kun la pretendoj por akvopurigaj instalajoj.

Pr. 10% de la plena investada programo servas celojn rekonstruadajn. Malnoviĝo de kelkaj dukto-retoj vekus rekonstruadajn pretendojn, sed la komunumaj servoj de la loĝejkonstruadoj foruzas la aliajn partojn de la materialaj eblecoj.

Renaskiĝanta lago: Velencei-tó

Evoluigo de la banejprovizado estas atingebla per rapidigo de rekonstruado de la banejoj en la ĉefurbo, kaj en *Harkány, Hajdúszoboszló,* ktp.

Agrokultura akvoservado

Por evoluigo de la irigacio estas planita 1200 milionoj da forintoj por ĉefinstalaĵoj kaj irigaciaj establaĵoj. La kvina kvinjarplano antaŭvidas kreskon de la irigaciataj teritorioj je centmil hektaroj. Ties pli granda ono — 90% — estas investado, realigota per propaj kostoj de uzinoj. La preparojn oni devas kunakordigi, ke la evoluigo okazu sur tiaj terenoj, kie la ekzistantaj ŝtataj ĉefinstalaĵoj aŭ aliaj akvoprovizoj ebligas la akvokvanton por irigaciado.



Kanalo Sió, elfluejo de Balatono

En tiu kadro ebliĝas konstruado de 9,5 mil novaj irigacigrupoj, unuavice en la tereno *Kisköre,* kie la akvoprovizejoj jam estas pretaj.

Forigo de akvaj malutiloj

7200 milionojn da forintoj antaŭvidas la plano por reguligo de riveroj, lagoj, ŝirmado kontraŭ inundoj kaj aliaj terenaj akvoj.

El tiu sumo plejan gravecon havas la kontraŭinundaj sistemoj kaj evoluigo de ŝirmadaj ilaroj.

Por akceli la akvoreguligon oni devas unuavice koncentrigi la evoluon de grandaj terenoj (ekz. departementoj Békés, Csongrád.)

En kadro de la investadoj de urbaj ktp. konsilioj unuavice ni mencias la evoluigon por forigi akvomalutilojn, — gravas la kontraŭinundaj konstruajoj en la ĉefurbo, aranĝado de akvoj sur loĝkolonioj, forkonduko de precipitaĵ-akvoj.

Medioprotektado

La kvinjarplano de la akvomostrumado planas grandajn sumojn senpere kaj pere por medioprotektado.

Senpera investado havos rondcifere 4,5 miliardojn da forintoj por evoluigo de la kapacito de poluakvo-purigado, sed pli granda parto de la investadoj, por anticipo de akvomalutiloj, servas same tiujn celojn. En ties planado, respektive realigo, kaj funkciigo estas pripensitaj la direktigaj principoj de medioprotektado.

Malgraŭ la grandaj spezoj la investada situacio ankoraŭ ne estas kontentiga. Manke de materialaj fortoj nur malrapide estas evoluigeblaj la poluakvon purigaj instalaĵoj de la loĝkolonioj, kaj novajn problemojn prezentas la polucioj devenantaj el la kemiizado de agrokulturo, kaj la lokigo kaj utiligo de la maldensa, likva sterko devenanta el la dombestejoj.

La hidrologia organizaĵo estas unueca kaj kompleksa direktanto kaj plenumanto de la medioprotektadaj taskoj de akvomastrumado. Apogante sin sur la kontraŭ-inundan organizaĵon, akirinta bonan praktikon, ĝi sukcese ekagas per rapida kaj koncentrita mobilizado ĉe efika forigo de neatenditaj, katastrofon alportontaj polucioj, kia estis en lasta tempo la oleopolucio en departemento *Zala,* la mazutpoluiĝo ĉe *Dunaújváros,* aŭ kiaj estis la eksterlandaj neatenditaj riverpolucioj.

Niaj rezultoj atingitaj por niaj taskoplenumadoj en la medioprotektado, estas rigardendaj nur komencaj paŝoj. La problemoj daŭre multiĝas. *Paralele kun la kreskanta akvouzo proporcie kreskas ankaŭ la akvopolucioj. Oni devas lukti kun novaj polu-fontoj: la sintezaj laviloj, radioaktivaj materioj radiantaj, la oleoj kaj oleoderivaĵoj, sarkindaĵdetruiloj kaj insekto-ekstermaj kemiaĵoj, kaj la koncentritaj akvopolucioj devenantaj el grandaj best-bredejoj estas novaj danĝerfontoj.* Kontraŭ tiuj ne sufiĉas la tradiciaj metodoj. Ilia neŭtralizo postulas novajn purigajn procedojn, ofte tujan efikan intervenon.

Ankaŭkondiĉo de la ĝisnunaj rezultoj estis la *aktiva kunlaboro de la socio* en la ekkono de la danĝero kaj forigo de la damaĝoj. Tiun kunlaboron eĉ pli grandmezure pretendas la kreskantaj taskoj de la estonto. Per rimedoj de la amas-informado oni devas certigi la aktivadon de la tuta socio.

Tr. A. *Pechan*

ENHAVTABELO de H. V. por 1976

Numeroj kun difinita karaktero

1. József Lengyel
2. Scienca fikcio
3. Hungara popolarto
4. La E-a libro
5. Ferenc Rákóczi
6. La E-a traduko

Prozo tradukita

(La nomoj de la tradukantoj per kursivaj literoj en parentezo)

Asimov: La unua leĝo. *(Auld)* (N-ro 2 paĝo 7)

Bahnov: Al la steloj. *(Fejes)* 2/12.

Benedek Elek: La maljunulino kaj la Morto. *(Maria Benczik)* 6/9

Borges: La domo de Asteriono. *(Varga-Haszonits)* 2/9.

Fekete, Gyula: Fantaziaj historioj el 2975. *(Rieth)* 2/13.

Illyés, Gyula: Harfajnaj radiketoj. (Ĥva kaj Bernard *Golden)* 3/23

Lázár, Ervin: La leporo kiel interpretisto. *(O. H.)* 5/18.

Lengyel, József: Hohem kaj Freier. *(Tárkony)* 1/2. — Antikritono. *(Kalocsay)* 1/5. — Sternekund kaj Reinekund. *(Varga—Haszonits)* 1/8. — Respondo al cirkuldemando. (István *László)* 1/9.

Mikes, Kelemen: Leteroj el Turkio. *(Ujlaky)* 5/8.

Molnár, Ferenc: La ludisto. (I. *Nagy)* 2/20.

Molnár, László: Bori Kis Jankó. *(Rieth)* 3/7.
La pigra kato. *(László)* 3/6

Prozo originala, eseoj

Cluskey: La fina inventaĵo. 2/14

Benczik, Vilmos: E-a tradukarto. 6/1.

Kalocsay, Kálmán: Pri la tradukarto. 6/8.

Rados, Péter: Literatura metiejo. 6/10.

Konisim Gaku: La kosmo-elmigrado. 2/10

Nemere, István: La kolektanto. 2/15 — Ĉevalo. 5/20

Szathmári, Sándor: Fragmento el „Kazohinio". 2/8

Silfer: Pri la stilo de „Maŝinmondo". 2/25

Tóth, Endre: Lappar, la Antikristo. 6/26

Zora Heide: Mistera hotelo. 2/18.

Knichal: Pensoj pri la kritiko. 5/20

Poezio tradukita

Berzsenyi: Velkas jam nia bosko. *(Kalocsay)* 6/12

Csorba: Ĉe sojlo de kosmo. 2/12 — Pli bone 6/7 *(Fejes)*

Fejes: Soldata Kanto. 3/4 — Montetflanke 3/5

Fet: Mi alvenis kun saluto. *(Logvin)* 6/7

Heine: En sonĝo princinon *(Zamenhof)* 6/6 — Lirika intermezo. *(Kalocsay)* 6/6

József, Attila: Por mia naskiĝtago. *(Fejes)* — Por naskiĝtago mia. *(Hlavathy)* — Je mia naskiĝtago. *(Rados)* 6/10, 11, 12

Kalocsay: Kuruckantoj. 5/7

Lengyel, József: Tri poemoj. *(Kalocsay)* 1/4

Lévay, József: Mikes. *(Fejes)* 5/7

Nekrasov: Hieraŭ ĉirkaŭ la sesa. *(Logvin)* 6/6

Pechan: Knabinetoj Karaj. 3/5

Petőfi: Patriota kanto. *(Grabowski)* 6/6 — Rákóczi. *(Fejes)* 5/3 — Kiam Rákóczi iris en Pollandon. (Bella *Sipos)* 5/3

Radnóti: Odo de hezito. *(Fejes)* 6/7

Shakespeare: Soneto LXXV. *(Kalocsay)* 6/15

Tamkó Sirató, Károly: Enkonduko en la militsciencon. *(Fejes)* 6/9

Verlaine: Aŭtuna kanto. *(Kalocsay)* 6/6

Weöres, Sándor: Hundbazaro. (Béla *Hules)* 6/6

Rados: Pensoj pri tri tradukoj de poemo de A. József. 6/11

Poezio originala

Auld: La Infana Raso IX. 2/6

Balbin, Julius: La vorto. 1/26

Benczik: Ero. 2/9

Gergely: Moto. 4/31

Goodheir: Tri poemoj. 2/26,29

Jevsejeva: In memoriam. 3/27

Kalocsay: Vespero en la parko. — La fundamento kaj la palaco. 2/21

Korinek: Krevis la kordo. 3/27

Dramo

Tonkin: Reĝo Lear kaj universaleco de Shakespeare. 1/14.

Pri hungaraj verkistoj

Gergely: La poeto de la fideleco. József Lengyel. 1/1.

Libroj, recenzoj, gazetoj

Eldonplanoj de HEA. 4/12.

Benczik, Maria: Sciencfikciaj verkoj en E. 2/14.

Benczik, Vilmos: Libroprodukto en 1975. 4/5
Historio de libroeldonado. 1/29

Etnografiaj donitaĵoj en Vjetnamio. — *Csiszár.* 1/28.

Zora Heide: Ni, homoj... Benczik 1/28.

Potts: Tri noveloj. Benczik 1/28.

Miyamoto: Historieto de la japana E-movado. Benczik. 1/29.

Fejes: Mi sekvas E-librojn. 4/6 — Persistaj presistoj. 4/8. — *Csiszár—Kalocsay:* 6000 frazeologiaj esprimoj. 1/32.

Konisi: La kosmoŝipo „Edeno". Benczik 2/30.

Gergely: Pri niaj datrevenoj. 5/19.

Giorgi: Ni bremsu papersvarmon. 3/14.

Lorjak: Neologisme. Benczik. 3/29.

Ueyama masao: Por forviŝi la memoron pri ŝi. *Benczik.* 3/29.

Vortaro E-a-Kamboĝa. 5/29.

Varga—Haszonits: Per realisma eldonpolitiko. 4/4.

Pri verkistoj

Kalocsay fariĝis 84-jara. *Csiszár.* 1/13.
Mortis *Kálmán Kalocsay.* 2/21.
La tutmonda esperantistaro kondolencas. 3/26.

Tárkony: Kalocsay. 3/27.

Nova eldonaĵo: El Streĉita Kordo de *Kalocsay.* 6/15.

Balkányi: Paŭlo *Lengyel.* 4/3.

Fejes Márton. 6/7

Rezulto de la belartaj konkursoj 5/15.

Lingvo

Bausani: Interlingvistiko kaj E. 4/29.

Hungara Vorthistoria Kolektaĵo 2/30.

Kalocsay: Lingvo kaj Logiko. 1/19.

Maller, Sándor: La multlingveco kaj UNESKO. *Gergely.* 5/27.

Artoj

Barabás: Multaj estas la kurucoj. *(Varga—Haszonits)* 5/11.

Domanovszky: Popola artmetio. *(Újlaky)* 3/8

Gergely: Arto de *Csontváry.* 6/17.

Lesznai, Lajos: Hungara popolmuziko. 3/11.

Ortutay, Gyula: La hungara popolarto. *(M. R. Szabó)*

Pechan: Hungaraj popolaj baladoj. 3/4.

Vasarely—fonduso. *(László)* 5/16

Zolnay kaj *Marosi:* Gotika skulptarto en Buda. *(Pechan):* 4/16.

Historio, politiko, paco

R. Candra: Ni kune servas la pacaferon. *(Tófalvi Éva)* 6/29

Fenyvesi, Ervin: Rákóczi. 5/1. — Eŭropo kaj la liberecbatalo de Rákóczi. 5/4.

Krúdy, Gyula: La sonorilego de Rákóczi. *(László)* 5/6.

Naturo, sanitaro, sporto

László, Ferenc: Lukto por la viviga akvo. *(Újlaky)* 1/20. — Medioprotektado. *(Pechan)* 4/20, 5/21 kaj 6/26.

Szenes, Imre: Interparolo kun d-ro Csanádi ĉefsekr. de la H. Olimpika Komitato. *(Újlaky)* 3/26.

Scienca fikcio

Letero al la III-a Tuteŭropa Konferenco de la sciencfikciaj verkistoj. 2/2.

Benczik: Scienca fikcio kaj E. 2/4.

Kuczka, Péter: La scienca fikcio. *(Fejes)* 2/1.

Varga—Haszonits: Pri la hungara sciencfikcia literaturo. 2/16.

Esperanta movado kaj historio

Tonkin: Novjara mesaĝo 1976. 1/27.

Bárczi, Gergely, Korach, Sugár: Letero al la parlamentanoj. *(SZMR)* 1/11. Iniciato de hungaraj parlamentoj *(vhzs)* 6/14.

Szenes: E. en parlamentoj. *(TI)* 4/26.

Varga—Haszonits: Konferenco de la E-fako en la Budapeŝta Universitato. 3/22.

Wacha: Pri esperantistoj de Pedagogia Altlernejo. 2/28.

Konstantaj rubrikoj

Bálint, Szilárd: Panoramo (dupaĝa). — Revuoj, en la 1-a n-ro *Tárkony,* ekde la 3-a n-ro *Mária Rózsa Szabó.* — Leterkesto. — Kalendaro. — Paĝo de FERI. — Humuro. Korespondi deziras. — Ŝako. — Poŝtmarkoj kaj milionoj. 3/30.

Kunmetis: L. *Kökény*



Medalo de Antal Czinder

LIBROJ POR ĈIUJ

Pri la eldon-agado de Hungara Esperanto-Asocio

En la numero 1976/4 de nia revuo aperis artikolo sub la titolo *Planoj, esperoj.* Ĝi heroldis pri la eldonaj planoj de Hungara Esperanto-Asocio. Poste, en la numero 1976/6 mallonga sciigo informis pri la aboneblo de „LIBROSERIO 1". Nun kun ĝojo ni donas pliajn informojn pri tiu ĉi komuninteresa temo, tiom pli, ĉar pluraj leteroj, senditaj al la redakcio, aparte petis nin pri tio.

La „LIBROSERIO 1" konsistas el kvar libroj: 1. Ferenc *Szilágyi:* KOKO KRIAS JAM! (Originala novelaro, entenanta kelkajn el la plej majstraj noveloj de nia literaturo.) 200 p. Prezo ĉe eksterseria aĉeto: 13,80 ned. gld. 2. Lajos *Tárkony:* DE PAĜO AL PAĜO (Originalaj eseoj, interalie pri *Baghy, Kalocsay, Schwartz, Forge, Hohlov.* Kun ĝisdatigita bibliografia sekcio.) 120 p. Prezo ĉe eksterseria aĉeto: 12,— ned. gld. 3. W. *Auld* —J. *Dinwoodie* —J. *Francis* — R. *Rosetti:* KVAROPO (Originalaj poemoj, unuafoje aperintaj en 1952, kiel debutvolumo de la skota skolo kaj ankaŭ de la eldonejo Stafeto. Estas aldonita ampleksa studo *Kvaropo kaj la skota skolo* de V. *Benczik.)* 250 p. Prezo ĉe eksterseria aĉeto: 18,— ned. gld. 4. Julio *Baghy:* EN MASKOBALO (Kvin originalaj unuaktaĵoj, verkitaj en prozo. Bela omaĝo al la deka datreveno de morto de la populara aŭtoro.) 125 p. Prezo ĉe eksterseria aĉeto: 12,— ned. gld.

Ĉiuj kvar libroj aperas kartonitaj, kun dukolora kovrilpaĝo, en la formato 18x12,5 cm. Kiel vi povis konstati la du unuaj verkoj jam estas aperintaj, la tria aperas proksimume samtempe kun tiu ĉi revunumero, kaj ankaŭ la kvara nepre eliros antaŭ la fino de junio.

La suma prezo de la kvar libroj ĉe eksterseria aĉeto estas 55,80 ned. gld., sed HEA kreis specialan favoran abonprezon por la kvar libroj kune: ĝi estas *35,— ned. gld!*

Esperantistoj en nesocialismaj landoj povas aboni la serion sendante egalvaloron de tiu sumo al la Centra Oficejo de UEA (Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam 3002, Nederlando; Poŝtĉekkonto: Nederlando 378 964) kun la indiko „por HEA-Libroserio 1". Baldaŭ post tio la Libroservo de HEA liveros al la hejma adreso de la aboninto la librojn ĝis tiam aperintajn. Kompreneble, la sekva(j)n libro(j)n la Libroservo sendos tuj post ties apero.

Hungaroj povas aboni la serion por 150,— forintoj, sendante la pagon per la normala enpagilo al HEA, skribante sur la enpagilo la vorton „Libroserio 1".

Esperantistoj en socialismaj landoj informiĝu ĉe la sialanda centra Esperanto-organizaĵo pri la abonmaniero. Krome, hungaraj esperantistoj povas aboni la libroserion por ili por 165,— forintoj.

Jam antaŭ la apero de la tuta *„Libroserio 1"* startas *„Libroserio 2",* kies lasta ero aperos plej malfrue en decembro de tiu ĉi jaro. Jen, la konsisto de la serio: 1. Endre *Ady:* LA MORTO DE ĈIELARKO (Elektitaj poemoj kaj artikoloj de la granda hungara poeto, naskita en 1877 kaj mortinta en 1919.) Ĉ. 120 p. Prezo ĉe eksterseria aĉeto 10,80 ned. gld. 2. F. V. *Dorno:* AVENTUROJ DE LIA REĜA MOŜTO STULTULOF LA DEKA DE FUŜIO (Ridiga satiro originale verkita, aperinta la unuan fojon antaŭ la dua mondmilito. La volumo enhavas de la sama aŭtoro ankaŭ la kriminalan komedion LEVU LA MANOJN!, kies agado disvolviĝas en Universala Kongreso de Esperanto...) Ĉ. 120 p. Prezo ĉe eksterseria aĉeto: 12,— ned. gld. 3. Sándor *Szathmári:* KAIN KAJ ABEL (Ĉiuj signifaj noveloj de la elstara aŭtoro, krom la jam aperintaj en la volumo *Maŝinmondo kaj aliaj rakontoj* ĉe Stafeto.) Ĉ. 220 p. Prezo ĉe eksterseria aĉeto: 16,50 ned. gld. 4. Vilmos *Benczik:* LIBRO DE ROMANOJ (La volumo konigas ses originalajn romanojn de Henri *Vallienne* kaj Heinrich August *Luyken,* aperigante ampleksajn specimenojn el la verkoj mem. Ĝi enhavas ankaŭ eseojn pri la du fruaj romanistoj.) Ĉ. 150 p. Prezo ĉe eksterseria aĉeto: 15,— ned. gld.

La abonprezo de *„Libroserio 2"* por esperantistoj en nesocialismaj landoj *estas 34,— ned. gld.,* por hungaroj *145,— forintoj.* Hungaroj povas aboni ĝin por amikoj en socialismaj landoj *por 160,— forintoj.* Kiel videble, abonantoj ankaŭ ĉe tiu serio ĝuas ne malgrandan rabaton. La abonmaniero estas la sama, kiel ĉe *„Libroserio 1".* Tiuj, kiuj abonas pere de la Centra Oficejo de UEA. plej utile, se abonas ambaŭ seriojn samtempe.

Krom la supraj verkoj, HEA eldonos dum 1977 ankaŭ aliajn librojn, kiuj povas kalkuli je granda populareco ĉe ĉiuj esperantistoj. Jen, kelkaj el ili: 1. Alfonso *Pechan:* GVIDLIBRO POR SUPERA EKZAMENO. (Ambaŭ volumoj kune) Gramatiko, Instrumetodo, Historio, Literurhistorio. (Tralaborita kaj ĝisdatigita reeldono de la sukcesa verko, kun ampleksigita bibliografia sekcio.) Ĉ. 220 p. Prezo: 7,50 ned. gld. (25,— forintoj). 2. Zoltán *Blau* (redaktoro): 133 TAGOJ DE SOVET—HUNGARIO. (Kolekto de artikoloj pri la unua hungara proleta ŝtato, ekzistinta dum 133 tagoj en la jaro 1919.) Ĉ. 155 p. Prezo: 9,— ned. gld. (28,— forintoj). 3. Atanas D. *Atanasov:* LA LINGVA ESENCO DE ESPERANTO. (Kolekto de lingvistikaj artikoloj.) Ĉ. 200 p. Prezo: 15,— ned. gld. 4. AUTOTURISMA VORTARETO HUNGARA—ESPERANTA—GERMANA—ĈEĦA—SLOVAKA—POLA. (Vortareto kiu kontentigas unuavice la bezonojn de per-aŭta turismo.) Ĉ. 32 p. Prezo: 3,— ned. gld. (8,— forintoj). 5. Árpád *Rátkai* (redaktoro): KION SCII POR ORGANIZI? (Artikolaro pri la plej efikaj metodoj de organizado por esperantistaj aktivuloj.) Ĉ. 150 p. Prezo: 10,80 ned. gld. (32,— forintoj). 6. Detlev *Blanke:* PRI LA INTERNACIA LINGVO. (Provizora titolo!) (Kolekto de artikoloj pri la lingvo Esperanto kaj ĝia movado.) Ĉ. 160 p. Prezo: 12,— ned. gld. (40,— forintoj).

La supraj 14 libroj ampleksas kune pli ol. 1800 paĝojn. Hungara Esperanto-Ascio decidis eldoni ĉiujn tiujn librojn, do, la efektivigo de tiu ambicia plano *ne* dependas de la interesiĝo de la publiko: la supraj libroj *nepre* aperos. Tio donas garantion al la abonintoj kaj abonontoj, ke ilia mono ne perdiĝos. Unu afero tamen *plene dependas* de la aĉetemo de nia publiko: la *daŭrigo de tiu intensa eldonagado en la jaro 1978.* Se la aĉetado de la du serioj kaj de la ceteraj libroj progresos kontentige, HEA povos realigi ankaŭ siajn planojn, eĉ pli ambiciajn ol la nunaj: por la jaro 1978. oni antaŭvidas la represon de la du volumoj de unua eldono de ENCIKLOPEDIO DE ESPERANTO, kaj aperigon de la dua, ampleksigita eldono de ESPERANTA ANTOLOGIO.

Hungaraj muzikistoj en la tuta mondo

I.

Laŭ la onidiro la hungaroj estas muzikema kaj altnivele muziktalenta popolo. Fakto estas, ke hungarajn muzikistojn oni povas trovi en ĉiu parto de la mondo. Per kelkaj ekzemploj mi volas pruvi tion kaj rememorigi al la kara leganto, kiom da hungaraj nomoj estas troveblaj inter la elstaraj kaj mondfamaj muzikistoj.

Ni komencu per la ĉie konataj kapelestroj. La nomo de Antal *Doráti* estas konata en larĝaj rondoj de la muzikamantoj. Li estas gvidanto de la Simfonia Orkesto de *Minneapolis.*

Ferenc *Fricsay* (*1914 Bp. † 1963 Bazel). Li estis ĉefmuzikdirektoro de la Opero de *München.* Multajn gramofondiskojn oni faris pri liaj prezentadoj. Li estis fervora prezentanto de modernaj hungaraj muzikverkoj.

Jenő *Ormándy* vivas ekde 1921 en Usono kaj estas nun kapelestro de la Simfonia Orkestro de *Philadelphia.*

Frigyes *Reiner* komencis kiel kapelestro de Budapeŝtaj oper-ensembloj. Nuntempe li gvidas la Filharmonian Orkestron de *Chicago.* Li estas ankaŭ komponisto.

La nomo de Georg *Sebastian* estis originale György Sebestyén, disĉiplo de la Budapeŝta Muzika Altlernejo *„Ferenc Liszt".* En la jaro 1940 li translokiĝis al Novjorko, sed nun li estas kapelestro de la Granda Opero de Parizo. En Parizo li gvidis la unuan prezentadon de la opero „La burgo de Princo Blubarbo" (de *Bartók*).

Ankaŭ Georg *Solti* estas bone konata muzikisto, gvidanto de la Opero de *Frankfurt a. M.* (Okcident-Germanio).

Jenő *Szenkár* naskiĝis en tre muziktalenta familio. Ankaŭ liaj du fratoj estas muzikistoj. Jenő Szenkár komencis sian karieron en Budapeŝto kiel kapelestro kaj nun li estas ĉefmuzikdirektoro de la Opero de *Düsseldorf* (Okcident-Germanio).

La supra nomaro ne entenas ĉiujn hungardevenajn dirigentojn*, kiuj akiris famon en la mondo. Tamen la mencio de ilia nomo bone montras, kiel multaj konataj hungaraj muzikistoj fundamentis la famon de la hungara muzikkulturo.

Kiam temas pri hungardevenaj pianistoj, same multaj nomoj estas menciindaj.

Antaŭ nelonge mortis Géza *Anda,* pianisto, vivinta en Svislando. Post triumfa turneo tra Eŭropo, li vojaĝis en la jaro 1955 al Usono kaj debutis tie kun la Filharmonia Orkestro de Philadelphia sub gvidado de J. Ormándy.

György *Cziffra,* unu el la plej eminentaj pianistoj, vivas en Parizo kaj entuziasmigas multajn aŭskultantojn per siaj koncertoj.

Tutmonde konata dirigento, komponisto, kaj unu el la plej grandaj interpretistoj de pianoverkoj de Beethoven estis Ernő *Dohnányi,* inter 1934—43 ĉefdirektoro de la Muzikakademio en Budapeŝto. Li mortis en j. 1960 en Novjorko, sed multaj gramofondiskoj konservas lian arton, eksonigantaj precipe la pianosonatojn de Beethoven.

Lajos *Kentner* loĝas nun en Londono; li estas bofrato de la mondfama violonisto Jehudi *Menuhin* kun kiu li ofte muzikas kune sur la koncertpodio.

Edward *Kilényi* apartenas al la disĉiploj de E. Dohnányi. Ankaŭ li estas unu el la pianistoj, kiuj alportas famon pri Hungario.

György *Sándor* apartenas al la vere grandaj pianistoj, konata kiel solisto de la Filharmoniaj Societoj de Los Angeles kaj Philadelphia kaj profesoro de la *Music Academy of the West* (en *Santa Barbara* — Kalifornio). Li prezentis la unuan fojon la III-an pianokonĉerton de Bartók.

Arnold *Székely* estis disĉiplo de István *Thomán* — kiel ankaŭ Béla Bartók. Li mortis en *Montreal* (1954).

Kiel mi enkonduke rimarkis, mi donis ĉi tie nur kelkajn ekzemplojn de hungardevenaj muzikistoj. La liston de famaj hungaraj kapelestroj kaj pianistoj oni povus longe daŭrigi.

Kompreneble multaj violonistoj, violonĉelistoj, kantistoj kaj ĉambromuzikensembloj vivas kaj muzikas dise en la mondo. Ilia nombro estas tiom granda, ke mi devas prokrasti la mencion de la respektivaj ekzemploj al la sekva parto.

Lajos *Lesznai*

*dirigento: orkestrodirektisto (vidu: PIV, paĝo 744. kaj Turista vortaro E—H)

ZIGZAGE TRA LIBROLANDO

Merlo sur Menhiro. — Originalaj poemoj de Albert *Goodheir.* Eld.: Glasgova Esperanto-Societo, 1974. 58 p„ 20 cm.

Ĝis nun. — Originalaj poemoj de Daphne *Lister.* Esperantaj Kajeroj n-ro 1. Manĉestro, 1976. 64 p., 11 cm.

Rimleteroj de Marjorie *Boulton* kaj William *Auld.* — Esperantaj Kajeroj n-ro 2. Manĉestro, 1976. 94 p., 11 cm.

Plukonstrue. — Originalaj poemoj de Edwin *De Kock.* Eld.: La Aŭtoro, (en Sud-Afrika Respubliko), 1975. 40 p., 20 cm.

Utaaro de Takuboku. — Tradukita el la japana lingvo de *Miyamoto* masao. Eld.: L' Omnibuso, Kioto, 1974. 119 p., 17 cm.

Kalevipoeg de Friedrich Reinhold *Kreutzwald.* (Fragmentoj.) Trad.: Hilda *Dresen.* Eld.: Eesti Raamat, Tallinn, 1975. 90 p., 14 cm.

Ĉeĥoslovakio. — Tridek jaroj. Eld.: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Praha, 1976. 42 p. plus 20 fotopaĝoj. 20 cm.

Paco kaj sekureco por la popoloj de Todor *Jivkov.* Eld.: Sofia-Press, 1975. 8 p., 14 cm.

La Esperanta libroprodukto ne estas tro granda, tamen digesti ĝin signifas ne malgrandan problemon por dumonata revuo. Nia redakcio devis konstati, ke la plenumo de tiu ĉi tasko neniel sukcesas per normala vojo: aperigo de pli-malpli detalaj apartaj recenzoj. Tiu ĉi rubriko do, kiun ekde nun oni trovos en ĉiu numero, nur estos iaspeca „revuo de libroj", simila al alia „revuo", la beltradicia „revuo de l' revuoj". Niaj legantoj tamen ne miru, se tiu ĉi revuado ne tuŝos ĉiun novaperintaĵon, ja verŝajne ne ĉiuj novaj verkoj atingos la „revuanton", kaj krome, ne skribi pri io ankaŭ estas iasenca kritiko...

Do ek! El la lastatempe iom anemia poezia produkto grave elstaras la poemaro de Albert *Goodheir: Merlo sur Menhiro. (Menhiro* estas megalita ŝtonmonumento, starigita vertikale.) Sen ia troigo oni povas aserti, ke ĝi estas eble la plej bona poezia verko, aperinta dum la lastaj jaroj. La ĉefa afero, kiu kaptas la leganton, estas la perfekta harmonio de arta prilaboriteco, vortekonomio kaj samtempa pensoriĉo. *Goodheir* estas versanga poeto, li perceptas la mondon poezie, tamen, tiu poezieco neniam malpliigas la klarecon de la perceptado de la reala mondo, eĉ male, pliintensigas ĝin. La sinteno de la poeto estas esence moralista, sed li ne reprezentas la minacvorte predikantan specon, kiu defendas tipe filistran, pseŭdoharmonian principaron. Lia gvidprincipo estas la humanismo, kaj ne cedas el ĝi eĉ por la trezoro de Dario:

Eĉ se mi kredus estontecon
paradizan,
kaj se enirbileto
kostus eĉ unu bebon dissŝiritan,
mi ĝin redonus (diru vi, pro
timo)
kaj restus kun la forĵetitaj en la
ŝlimo.

Du poemlibroj aperis kun rapida sinsekvo en la debutanta serio *Esperantaj Kajeroj* (Britio). La unua estas *Ĝis nun* de Daphne Lister. La volumeto enhavas mallongajn, epigramecajn poemojn — tre spritajn. Lister grimacas al la mondo, kaj ŝiaj grimacoj tute ne estas virinece molaj. Tamen, versoj kiel *Pekadon rekompencas mort', / Atendas virton sama sort'...* ne nepre interpretendas, kiel signo pri manko de etika sinteno...

La dua libreto estas *Rimleteroj* de M. *Boulton* kaj W. *Auld.* La du poetoj korespondis per rondeloj en la jaroj 1953—1954, kaj nun, post pli ol dudek jaroj, la publiko certe volonte legos tiujn entute 84 poemojn, kiuj foje facile vibras, foje ombre filozofadas.

Venis pakaĵeto ankaŭ el Suda Afriko: la nova poemlibreto *Plukonstrue* de Edwin *De Kock.* Tiu novaĵo bedaŭrinde gravege postrestas al la pli fruaj verkoj de la fama poeto. Ne estis pli ĝojiga legaĵo la *Utaaro de Takuboku,* tradukita de *Miyamoto.* Bedaŭrinde la tradukinto ĉi tie okulumis al eventualaj postaj el-esperantaj tradukoj, kaj, pro tio la Esperanta teksto aspektas iom kruda.

Male, tre salutinda estas libreto alveninta el Sovetio; ĝi enhavas fragmentoin el la estona popola eposo *Kalevipoeg* en brila traduko de Hilda *Dresen.* La rave muzikantajn versojn enkondukas erudicie verkita antaŭparolo, kiu multe helpas al la leganto kompreni kaj inde aprezi tiun ĉi artverkon, kiu samrange viciĝu sur via librobreto kun la Esperanta *Kalevala,* tradukita de Leppäkoski. La plaĉa libreto enhavas ankaŭ plurajn kolorajn ilustraĵoin.

Fine de nia zigzagado ni ne forgesu mencii la eldonaĵon *Ĉeĥoslovakio — Tridek jaroj,* kiu enhavas artikolon ankaŭ pri la Esperanto-movado en Ĉeĥoslovakio, kaj la verketon *Paco kaj sekureco por la popoloj,* kiu estas fakte parolado de Todor *Jivkov,* prezidanto de la Popola Respubliko Bulgario. — okaze de la Konferenco de Helsinki.

Vilmos *Benczik*

Paŭlo Balkányi

1894. 03. 11. — 1977. 02. 25.

Du datoj, — inter ili home homa vivo de 83 jaroj, kaj vivo de 68 jaroj en Esperantio... Kio sin kaŝas en tiuj du vivperiodoj!

La redaktoraro de Hungara Vivo adiŭante sian ĉefkunlaboranton unue esprimas sian kunsenton al la familio, al la kara edzino, kiu dum longa, harmonia vivo apoge staris apud la edzo.

Adiaŭdiras Hungara Esperanto-Asocio al sia iama komitatano, — UEA al sia honora membro, iama ĉefdelegito, — la pacmovado al la plej aktiva batalanto, ja por Balkányi E-a laboro signifis laboron por la paco, — kaj *onklon Paŭlon* adiaŭas triste pioniroj, iamaj gelernantoj, kiujn li instruis, verkinte por ili movadajn kaj esperantigitajn popolajn kantojn, gardataj en lernolibroj, kantaroj.

Pri kio rememori el la vastaj kampoj de lia agado? Jen kelkaj: Jam antaŭ la unua mondmilito, li aperigis artikolon en *La Revuo* (de *Bourlet*) pri hungara literaturo. Dum la milito li multe korespondis eĉ kiel soldato, — en 1921 li aperigis la unuan poemaron de *Kalocsay: Mondo kaj koro,* — li organizis efikan gazetservon en- kaj eksterlande pri kaj por E. En jurnaloj nacilingvaj kaj revuoj E-aj de tiam aperadis liaj artikoloj, noveloj, poemoj, — ĝis la lasta artikoleto en antaŭa n-ro de HV. Apartenas al liaj plej gravaj aktivadoj: enkonduki E-n en la praktikan vivon: en komerco, industrio, internaciaj foiroj. Kiel kunlaboranto de la konata *„Gvidlibro por supera ekzameno"* li verkis tre utilain ĉapitrojn pri tiu tereno de E, kaj kiel membro de la Ekzamena Komitato li estis ĉiam laborpreta de ĝia fondiĝo (1939) ĝis la mortolito.

Kaj sur la titolpaĝo de Literatura Mondo (1922) ni legas la nomojn de la redaktoraro: Teodoro *Schwartz,* Julio *Baghy,* Kolomano *Kalocsay,* Paŭlo *Lengyel,* Paŭlo *Balkányi.* Unu post la alia, ili forpasis. Ĝis antaŭ kelkaj tagoj, Balkányi estis la sola vivanto el tiu glora vico, — nun ankaŭ li foriris kiel lasta...

Tutvive li estis tiu *homa homo,* kiu efektivigis la admonon de Julio Baghy: *„Por teran pacon formi vi homo restu hom'."*

Redakcio de Hungara Vivo — Prezidantaro de Hungara Esperanto-Asocio.

Paĝo de FERI'

PRI LA RIMADO



Ni citas el poemo de Goethe (Traduko de Kalocsay) La kvar versoj kaŝiĝas en linioj 2. horizontala, 58. vertikala, 51. hor. kaj 18. vert. Ensendi sufiĉas ties solvon ĝis la 1-a de julio. Inter solvantoj ni lotumos premiojn.

Horizontale: 13. Ŝtono falinta surteren el la spaco (R) 14. Poseda pronomo, 15 Skrapi kampon per fera ilo (R) 16. Poŝtkesto 17. Mondpaca Esperanto Movado. 18. Sekvas post la sepa. 20. Prepozicio 21. Alma- . : ĉefurbo de soveta respubliko. 23. Malgranda kantbirdo, nigra. 25. Konscie 27. Vestaĵo, 29. Artefarita kavaĵo en muro (R) 30. Di-servo kun ceremonioj. 31. Longa kvadratigita lignopeco por konstruado 33. Jena fragment', montra adjektivo kaj radiko) 35. Numeralo 36. Nia planedo. 39. Identaj konsonantoj. 41. Tuto de gefiloj (R) 42. EZ, 43. Refleksiva pronomo. 44. Al iu direkto. 46. Sama kiel 42. 47. IT. 49. Prepozicio 54. Finaĵo de futuro 55. Reen: tabelvorto 56. RT, 57. Kemiaj simboloj de: oksigeno, kalio kaj hidrogeno. 59. Reen: sufikso por esprimi ion pli malgrandan 61. Sufikso esprimanta kolekton. 62. Libro — angle 64. Tabelvorto, 65. Forigas, malaperigas. 69. Fabela estaĵo malgranda (R) 71. Supernatura estaĵo (R), 72. faros specialan paŝon en ŝako. 74. Rivero en Jugoslavio, 76. Ne viraj, 77. Kunfiksi du metalpecojn (R) 79. Granda platboato (R) 80. Supren movas 82. Arbo el kupuliferacoj, uzata por mebloj (R) 84. Adverbo. 85. IT, 86. Miksita aro! 87. Reen: prepocicio 89. Sufikso por esprimi paron de viro. 90. Batilo el ŝnuro aŭ rimeno (R), Konsistas el 365 tagoj. (R) 93. Proponas al iu varon aŭ servon aĉetotan.

Vertikale: 1. La adjektiva formo de verbo (artikoloj kaj radiko). 2. Universitata titolo (R), 3. Sufikso, 4. Frukto (R)., 5. Teologo, interpretanto de Korano (R), 6. Longa leda strio (R), 7. AT, 8. Kolora fluaĵo por skribo, 9. Poseda pronomo, 10. OA, 11. Komuna prepozicio, 12. Deflankiĝi de la ĝusta vojo (R), 19. Per ripetitaj batoj pecetigas aŭ pulvorigas, 22. Estro de monaĥejo (R), 24. Posedanta multajn havaĵojn (R), 25. Ŝlosi (R), 26. EO, 28. Konformiĝi je ordono aŭ malpermeso de alia. 30. Manĝebla kaj farunigebla flava grajna vegetaĵo. (R), 32. Honori iun publike, 34. Finfarita, 35. Duono de kvar, 37. Ŝirmejo, ripozejo en dezerto, 38. Membro, 40. Al kio ni kuraĝe iras, 45. Konstrui loĝejon por birdoj, 47. Persona pronomo, 48. Ronda konstruaĵo kun kupolo (R), 50. Ŝovi la langon sur io, 52. Provizora kostruaĵo, 53. Substanco uzata en hemio (R), 60. Eligas nevideble 61. Membroj, 63. Aro de materiaj partoj konsistigantaj vivulon (R), 66. Persona pronomo, 67. Moviĝas de iu loko al alia. 68. Trovo de problemo, diveno de enigmo, 70. Primtempa monato (R), 73. Franca romantika verkisto (Eugene, 1804—57), 75. Prezentas sinsekvajn diversajn ŝanĝigojn, 76. Reen: persona pronomo, 78. Sukcesa pafo estas tia, 81. Radikalo en pluraj komponaĵoj, C^2H^5, 82. Riverfiŝo. 83. Ŝtofo el delikata lano de ondoforma supraĵo (R), 86. Gento (R), 88. Adverbo, 91. Italia rivero, 92. Adverbo, 93. OR, 94. TN.

La ĝusta solvo de nia enigmo aperinta en nro 76/6: *„La arto plej perfektas, se ĝi tiel sin kaŝas, ke ni ĝin eĉ ne rimarkas."*

Libropremion gajnis: K. *de Boer*, NL, A. S. *Melnikov*, SU, kaj Imre *Jámbor*, Hung.

Adiaŭo kaj alvoko de FERI

Antaŭ dek jaroj aperis nia unua enigmo en la Esperanta gazetaro, kaj ekde 1970 ni kontribuis al ĉiu numero de Hungara Vivo, lastatempe ankaŭ per „Lingvaj Ludoj".

Kiam nun, pro alispecaj preferataj okupoj kaj akceptataj laboroj en Esperantio ni devas ĉesigi tiun nian agadon, — antaŭ ĉio ni dankas la perleteran apogon kaj kontribuaĵon de niaj korespondantoj.

Ni esperas, ke nia laboro ne estis vana, ke ni sukcesis doni al niaj legantoj kelke de agrablaj horoj, iom da amuzo kaj ankaŭ instruo.

Tamen, estus dezirende, se iu — eble el la stabo de niaj korespondantoj — daŭrigus la ludojn de ni iniciatitajn. Ni estis nur semantoj ... eble iam donos ankaŭ fruktojn nia agado.

En la sekvonta numero debutos per krucenigmo nia amiko s-ro SEMO. Ni petas ankaŭ por li apogon, instigon kaj kuraĝigon. Ankaŭ ideojn, proponojn kaj pretajn manuskriptojn por „Lingvaj Ludoj". Por la akceptitaj manuskriptoj krom publikigo HV pagos ankaŭ honorarion.

Márton FEjes — *László* RIeth

Lingvaj ludoj

Difina Komedio — aŭ Plena Vortaro de FERI

Substantiv' el dek literoj,
ĝi signifas oficiston,
kiu zorgas pri leteroj,
por protokol' faras liston,
kaj decidojn disen sendas,
laboras li pensoriĉe,
ĉefon ofte reprezentas, —
sed ni haltu, jam sufiĉe...

En skriba form' en vicordo
subjunkci' komence estas,
fine staras tabelvorto,
interne ceteraj nestas.
Helpu solvon ĉi indiko:
»bastonet' el kalko, blanka
por skrib'« sekvas (nur radiko)
kaj sufikso esprimanta
la kolekton da aferoj.
Sed se alie dividi:
en l'unuaj ses literoj
misteron ni povas vidi.
La restinta vorto-ero
estas: solo en opero.

Kio estas do tio?
Diru: .....

Humuro

Sinjoro ekvidas en galerio la pentritan nudon de sia edzino. Furioze li kuras hejmen.

— Kio do, Matilda, vi pozis modele al pentristo tute senveste, naskiĝ-nude?

— Ej, karulo, kial vi estas tiel ekster vi? La pentristo pentris min nur el memoro.

* * *

En trajna kupeo junulo senĉese maĉas maĉo-gumon. Vidalvide al li sidas olda oĉjo. Post kelka tempo li alparolas la junulon:

— Tre kompleze de vi, ke vi volas min amuzi per via parolo, sed bedaŭrinde mi estas surda.

* * *

Sinjoro rapidas sur vilaĝa strato al la fervoj-stacio. Li demandas kampulon renkonte venantan:

— Ĉu mi atingos ankoraŭ la trajnon je la 14-a kaj 33 se mi iros rekte trakampe?

La kampulo, post kelka pensado:

— Jes, mi opinias. Eĉ la trajnon je la 14-a kaj 10 vi atingos certe, se la virbovo vin rimarkos.

* * *

Post tagmanĝo la edzo prenas gazeton kaj legas, laŭ sia kutimo, laŭte la informojn, aldonante siajn rimarkojn.

— Ĉesu jam! — interkrias la edzino.

— Kiel mi komprenu ĉi tion?

— Tiel, ke mi jam havas sufiĉe el ĉio tio. Ĉiutage tio sama: Proksim-Orienta krizo, agreso, invado, atom-

* * *

Knabeto sieĝas la patrinon:

— Panjo, ĉu ankaŭ mi povos esti iam gangstero?

— Jes, fileto, se bone vi kondutos.

Viro preskaŭ 80-jara edzinigas junulinon. En la nuptovojaĝo li ŝin demandas:

— Diru, Etulinjo, ĉu vi ricevis edukadon seksan?

— Ne — repondas la junedzino ruĝiĝante.

— Tio estas tre bedaŭrinda, ĉar mi ĉion jam forgesis.

* * *

Serĝento diras al la soldatoj:

— Knaboj, mi havas por vi du surprizojn, unu agrablan kaj unu malagrablan. La malagrabla estas tio, ke ĝisvespere ni devas plenigi per sablo tri mil sakojn. Kaj la agrabla estas tio, ke da sablo ni havas abunde.

* * *

Onjo ŝercadas kun okjara knabineto:

— Ĉu ne, se vi estos granda, vi volos edziniĝi.

— Mi ne volas edziniĝi nur havi infanojn.

La onjo ridas laŭte pri la respondo.

— Vi ne devas tiel ridegi, — diras la knabineto serioze, — tiaĵo, nome, ekzistas.

* * *

Inter la junaj geedzoj okazas la unua kverelo. Fine la edzo ekkompatas la virineton kaj diras:

— Bone, mi rekonas, ke pravas vi.

— Malfrue — eksploregas la edzino. — Dume mi ŝanĝis mian opinion.

ŜAKO

"Gens una sumus" - Unu gento ni estas

Rubrikestro: D-ro Jozefo *Németh*
5-a numero
Antonio *Piatesi*
(Italio)
D-ro Páros: memor-turniro 1976.
I-a premio



Mato en 2 movoj (komencas Bl.)

Bl.: Ra6, Tc 4, Te6, Kf2, Ĉc5, Ĉg4, b3, c6, d3, f3, f5 (11)
Ng.: Rd5, Dh2, Te1, Th6, Ka1, Ke2, Ĉc3, Ĉf6, a5, d4 g3 (11)

Limdato por la solvoj: 20-a de julio (sur la koverton skribu „ŜAKO"). Po 2 premioj estos lotumitaj, trifoje dum la jaro.

Solvo de la 4-a problemo: 1. Ke5! estas la ŝlosilmovo. *Atentu:* pro preseraro mankis ĉe la 2-a problemo Bl. Td8.

Dezirantoj korespondi pri ŝako skribu al la rubrikestro, kiu volonte peradas kaj leterojn, kaj adresojn al kiu ajn lando.

Por la bonaj solvoj de problemoj (1-a kaj 2-a) gajnis libropremiojn per lotado: József *Bajtay* (Heves), Antal *Szegi* (Budapest).

ŜAK-LEKSIKONETO

EŜGH — Esperanta Ŝak-Grupo Hungara — fondiĝis la 18-an de decembro en *Kalocsa,* kiel nova landa fakgrupo en Hungario. Jam aliĝis 50 membroj el multaj departementoj kaj Budapeŝto: ankaŭ vi aliĝu al EŜGH! La celo de la landa fakgrupo estas utiligi Esperanton en ĉiuj sferoj de la ŝakludo kaj — movado.

Kiel eksterlandanoj povas aligi al Universitato?

Responde al pluraj informpetoj ni ĉi-sube sciigas la interesiĝantojn.

La Esperanto-fako funkcias kiel suplementa fako, do oni devas elekti ankaŭ alia(j)n fako(j)n prefere ĉe la Filologia Fakultato, ekz. historion, la hungaran lingvon kaj literaturon, alian lingvon, bibliotekadon, popolklerigon, filozofion k. s.

Sed antaŭ ĉio *eksterlandanoj* devas partopreni unujaran antaŭpreparon pri la hungara lingvo en Budapeŝto, kiun gvidas la Internacia Prepariga Studinstituto (Nemzetközi Előkészítő Intézet, Budapest XI., Budaörsi út 73/75. Poŝtadreso: H-1502 Budapest, Pf 6.).

La kondiĉo de la partopreno en la lingva preparigo estas havi stipendion de la propra ŝtato (do germanoj de la germana, poloj de la pola ŝtato ktp.) Post la unujara prepara kurso la studonto devas fari sukcesan ekzamenon pri la hungara lingvo, poste sukcesan akcepto-ekzamenon ĉe la universitato pri preskribitaj studobjektoj, depende de la elektitaj fakoj.

Se la kandidato estos akceptita ĉe la universitato, tiam komenciĝas 5-jara studado. En la dua jaro de la universitataj studoj oni povas aliĝi al la E-fako. En la unua jaro ankaŭ ĉi tie estas lingva preparkurso pri Esperanto por komencantoj. Kiuj ne bezonas tion, tiuj povas aliĝi al la E-fako en la tria studjaro, do entute oni 3 jarojn studas E-on resp. interlingvistikon, kaj oni finas la E-fakon samtempe kun la aliaj fakoj.

Do, resume la paŝojn laŭvice: 1. peti kaj havi stipendion de la propra ŝtato por iu studobjekto studebla nur en Budapeŝto, 2. aliĝi al la unujara prepara kurso pri hungara lingvoscio en Budapeŝto. 3. fari sukcesan ekzamenon pri la hungara lingvo, 4. fari sukcesan akcepto-ekzamenon ĉe la universitato (Eötvös Loránd Tudományegyetem Bölcsészettudományi Kar, H-1364 Budapest, Pf. 107.), 5. en la dua resp. tria jaro aliĝi al la E-fako (kies gvidanto estas prof. dr. István Szerdahelyi.)

Leterkesto

Cosme Benito Resina, Mantijo, Portugalio: ĉe vi denove ĝermas nia movado, despli donas novan elanon al HV se niaflanke ni povas helpi per plezurdonaj legaĵoj kaj bildoj — kiel vi aprecas la rolon de HV, — plu citi el via letero, saĵnus ja eble nemodeste. Menciinde, ke pri medio-protektado apenaŭ estas legebla en portugalaj gazetoj, sed eĉ malpli okazas veraj agoj, kvankam „niaj riveroj estas tute poluitaj, kloakoj de la fabrikoj; sekve la afero estas ege aktuala!" Bindigi malpli grandan formaton estus eble pli facile, tamen estas pli grave, ke HV restu ĉe sia granda formato.

Estela de Jesus Santos, Goiania, Brazilio; el ĉefurbo de stato *Goiás* vi varmege salutas nin, rakontante, ke vi plurfoje legas ĉiun numeron de HV, kaj por perfektigi vian lingvoscion, kaj pro plezuro. Ni faros nian devon nepre, same *perfektigante daŭre nian revuon* kaj enhave, kaj lingve, stile, kaj tipografie — tiel ni respondas al pluraj similaj pretendoj, kiujn ni ne kapablas ope per letero aŭ en ĉi-rubriko respondi. La poemon pri Zamenhof de tiea poeto, kiun vi lerte tradukis el la portugala, ni gardos en nia arĥivo, koran dankon pro ĝi!

T. Kulagin, Moskvo: ni plenprofunde funebras la forpason de la bone konata, entuziasma kaj sindona, elstara veterano de la movado: prof. *Armand* D. L. (1905—1976). Liaj meritoj estas tro vastaj por rapide priskribi, post ricevo de tiu trista informo: doktoro de geografiaj sciencoj, aŭtoro de altkvalita libro, kaj de sennombraj artikoloj, pledantaj por Esperanto, kaj en la akademiaj rondoj en SU, kaj en sciencaj medioj tra la mondo. Lia alta, serioza figuro ne videblos plu dum E-Kongresoj, liaj admonaj leteroj kaj avertaj artikoloj ne plu atingos redakciojn, kiuj taksis ilin — inter la plej fundaj eseoj. Lia memoro restos por ĉiam en la esperantistaro! Multon perdis la Sovetunia movado, perdis lia familio: HV aparte kondolencas al lia vidvino *Ludmila,* same veterana kaj fervora esperantisto.

HUNGARA VIVO

Ĉefredaktoro: *Mihály Gergely*
Responda redaktoro:
d-ro István Nagy
Arta redaktoro: *Jozefo Szekeres*

Redaktoraro:
Szilárd Bálint, Vilmos Benczik, Ada Csíszár, Márton Fejes, Ervin Fenyvesi, István László, d-ro Lajos Lesznai, László Rieth, d-ro Mária Rózsa Szabó, Tibor Ujlaky-Nagy, Zsuzsa Varga Haszonits

Ĉefkunlaborantoj:
Ludoviko Kökény, Alfonso Pechan, Aurél Ponori Thewrewk, d-ro István Szerdahelyi, Lajos Tárkony.

Redakcio: Budapest VIII., Kenyérmező utca 6.
Telefono: 141-078, 137-872

Eldonas: „Népszava" Gazeteldona Entrepreno, Budapest VII., Rákóczi út 54.

Responda eldonisto: D-ro Péter Suth direktoro

Disvastigas la Hungara Poŝto. Abonebla en ĉiuj poŝtoficejoj, ĉe la gazetkolportistoj de la Centra Gazetoficejo de la Poŝto (K.H.I. 215—96162 1900 Budapest V., József nádor tér 1.) senpere, aŭ per poŝtmandato.

La abono estas por jaro (ses numeroj) Ft. 48.—, al eksterlando krome Ft 9.60 por afranko.

Peranto al eksterlando: KULTURA, H—1389 Budapest P.O.B. 149
Abonprezo por unu jaro (ses numeroj): 7,— Usonaj dolaroj aŭ egalvalora sumo en alia valuto

77-464 Somogy m. Ny. 3300
Responda gvidanto:
Béla Farkas direktoro
Indexszám: 25 377
ISSN 0018—7704

LEHEL

LIZENZ BOSCH HAUSGERÄTE

La Fridujfabriko ampleksigis la serion de mastrumaj fridujoj.
Jen la du unuaj tipoj de la nova produktaj-familio:

1. 160-litra, dustela-, kun 18 litra ultrafridigejo ĝis —12 °C; produktita surbaze de BOSCH—licenco; prezo: 5170,— Ft.
2. 200-litra, dustela, kompresora fridujo-, kun 18 litra ultrafridigejo ĝis —12 °C; prezo: 5640,— Ft.

Fabrikas: Hűtőgépgyár



Konsumturist



Valoraj artobjektoj
porcelano de bona marko
stilmebloj

Varojn aĉetitajn
en subaj vendejoj oni povas
sendogane elporti el la lando

Vi povas aĉeti el granda sortimento kontraŭ valuto
internacie ŝangebla

en niaj vendejoj en Budapeŝto:
I., Hess András tér 3.
VI., Népköztársaság útja 27., kaj 43.
Hotel Intercontinental — Hotel Gellért